

# Amerika Esperantisto

Vol. 10

DECEMBER, 1911

No. 8

## *Letero el Moravio* *A Letter from Moravia*

PROSTEJOV, MORAVIO,  
Nov. 9a, 1911.

Kara Sinjoro Reed:—

Ricevinte vian korespondadon de la 26a p. m., mi prenos tempon ĉi tie raporti pri la pri-Kaliforniaj paroladoj, post tiu en Krakovo, la urbo de la venonta Oka Kongreso.

Unue mi trafis la galician urbon Lvov (kiu, por faciligi aferojn ĝenerale, havas ankaŭ du aliajn nomojn, Lemberg kaj Leopold!). Tie la Esperanta grupo sukcesis enmeti en la regularan programon de la plej granda kinematografa teatro mian prezentadon. Tuj post la elmondo de miaj bildoj,—200, kiujn ni klarigis unue en Esperanto, poste en pola lingvo,

—la direktoro proponis aranĝi la prezentadon ankoraŭ du pliajn fojojn! Do en Lvov-Lemberg-Leopold mi parolis trifoje antaŭ pli ol 2,500 personoj! Trapasinte Budapeŝton, mi vojaĝis al Belgrado, kaj tie, kvankam pro malbonaj poŝtaj rilatoj la grupoj estis tute ne avertitaj ke mi venos, ili en tri horoj estis tute afiŝintaj la urbon por reklami miajn paroladojn. Oni luprenis la nove konstruitan *Casino* kaj tie mi paroladis sep fojojn antaŭ 2,200 personoj. El tiu nombro eble 1,500 estis ĝelernantoj en la gimnazioj kaj normalaj (altaj) lernejoj de Belgrado; kaj pro tio mi faris des pli bonan reklamon, ne nur por Esperanto

sed ankaŭ por la kaliforniaj komercaj ĉambroj. Nur demandu al iu ajn knabo aŭ knabino en la serba ĉefurbo Belgrado, ĉu ĝi ion scias pri Kalifornio aŭ pri Esperanto, kaj la okuloj brilos kun plezuro je rememoro pri la horoj en kiuj ĝi faris,

PROSTEJOV, MORAVIA,  
Nov. 9, 1911.

Dear Mr. Reed:

Having received your correspondence of the 26th ult., I shall take the time here to report concerning the lectures on California, after the one in Cracow, the city of the coming Eighth Congress.

First I reached the Galician city Lvov (which, to make things easier generally, has also two other names, Lemberg and Leopold!). There the Esperanto group succeeded in putting my presentation into the regular program of the largest cinematograph theatre. Immediately after the exhibition of my pictures,—200, which we explained first in Esperanto, afterwards in the Polish language,—the director proposed to arrange the presentation still two more times! So in Lvov-Lemberg-Leopold I spoke three times before more than 2500 persons! Passing through Budapest, I journeyed to Belgrade, and there, although on account of bad postal service the groups had not been notified at all that I was coming, in three hours they had placarded the whole city to advertise my lectures. They hired the newly built *Casino*, and there I lectured seven times before 2,200 persons. Of that number possibly 1,500 were students of both sexes in the gymnasiums and normal (high) schools of Belgrade; and therefore I did that much better advertising, not only for Esperanto but also for the California Chambers of Commerce. Just ask any boy or girl in the Servian capital, Belgrade, whether he or she knows anything about California or about Esperanto, and the eyes will shine with pleasure at the recollection of the hours in which he or she made, with an

kun Esperanta gvidanto, mallongan vojaĝon tra la mirlando de Ameriko!

Post Belgrado mi iris al la bosnia lando por unufoje paroli antaŭ 500 aŭdantoj en Sarajevo. Pro la lingvaj malsamecoj, oni tie tradukis la paroladojn en du lingvojn,—serban kaj germanan. Per afableco de la tiea U. E. A. delegito mi havis rabaton de 50 procento sur ĉiuj fervojoj de Bosnio-Hercegovino. Jen praktika helpo de samideaneco!

Post Sarajevo, mi faris sufiĉe grandan salton al Zagreb (Agram), kie mi unufoje faris la paroladon. Post la parolado ni ĝuis unu el la famaj "amuz-vesperoj" pro kiuj la tiea grupo estas konata.

De Zagreb alia longa vojaĝo, denove tra Budapeŝto, por atingi Kolozsvár, "la Bostono de Hungarujo." En Kolozsvár la tutan aferon aranĝis la tiea nobla Komerca Cambro, kies prezidanto estas unu el la subtenantoj de la Esperanta grupo. Mia parolado okazis en la universitato, kaj ĉeestis pli multaj ol 600 aŭdantoj, en ĉambrego taŭga por ne pli ol 350! Poste, la ĉefa profesoro en la universitato (kiu estis terura malamiko de la lingvo Esperanto, kaj kiu faris por mi la aranĝojn supozante ke mi parolos angle!) mem faris paroladeton en kiu li instigis la lernadon de Esperanto, kaj tre aprobis ĝin! Dua parolado estis necesa, kaj tiu okazis en la aŭlo de la Unitaria Kolegio, antaŭ pli ol 400 ĉeestantoj.

Nun mi estas en la moravia urbo Prostějov (Prosnitz), kie mi morgaŭ vespere parolados. De ĉi tiu urbo mi havis jam de longe inviton; antaŭ mia foriro de Usono mi ricevis ĝin. Kaj la Afero bone prosperas ĉi tie, kiel cetera en la tuta Aŭstrio kaj Hungarujo. Tion vi povas juĝi, sciante ke en la lastaj 16 tagoj mi parolis 12 fojojn, antaŭ entute pli ol 6,000 personoj. Ni devas certe konfesi ke ne ĉiuj estas esperantistoj, sed de reklama vidpunkto tio ne estas grava, ĉar ni konigis Kalifornion, en plej efika kaj konvinka maniero, al granda kaj inteli-

Esperanto guide, a short journey through the wonderland of America!

After Belgrade I went to the Bosnian country to speak once before 500 listeners in Sarajevo. On account of linguistic differences, they translated the lecture there into two languages,—Serbian and German. Through the courtesy of the local U. E. A. delegate I had a rebate of 50 per cent on all the railroads of Bosnia-Hercegovina. Note there a practical help from Esperanto fellowship!

After Sarajevo, I made a long enough jump to Zagreb (Agram), where I delivered the lecture once. After the lecture we enjoyed one of the famous "amusement evenings" for which the group there is known.

From Zagreb another long journey, once again through Budapest, to reach Kolozsvár, "the Boston of Hungary." In Kolozsvár the whole affair was arranged by the fine local Chamber of Commerce, whose president is one of the supporters of the Esperanto group. My lecture took place in the university, and there were present more than 600 hearers, in a lecture-room suitable for not more than 350! Afterwards, the chief professor in the university (who was a terrible enemy of the language Esperanto, and who had made the arrangements for me supposing that I would speak in English!) himself made a short speech in which he urged the learning of Esperanto, and thoroughly approved it! A second lecture was necessary, and that took place in the large hall of the Unitarian College, before an audience of more than 400.

Now I am in the Moravian city Prostějov (Prosnitz), where I am going to lecture tomorrow evening. From this city I had an invitation long ago; before my departure from the United States I had received it. And the cause is prospering well here, as, for that matter, in the whole of Austria and Hungary. This you can judge, knowing that in the last 16 days I have spoken 12 times, before more than 600 persons in all. To be sure, we must admit that not all were esperantists, but from an advertising standpoint that is not important, for we made California known, in a most effective

genta publiko. Kiu povas diri de nun ke Esperanto ne taŭgas kiel reklama lingvo?

Ankaŭ, kiel ekzemplo de samideaneco, kiun mi ĉie kaj ĉiam dum la tuta vojaĝo spertis, mi rakontos al vi pri mia vojaĝo inter Belgrado kaj Sarajevo.

Oni devas dufoje trapasi la landlimojn, farante ĉi tiun vojaĝon, kaj el Belgrado la grandanima delegito S-ro Andonoviĉ vojaĝis kun mi al la unua landlimo, por faciligi, se bezone, la ŝanĝon de vagonaroj, la doganajn inspektojn, k. t. p. Poste, en Vinkovce, la tiea delegito S-ro Staniŝiĉ min atendis, kune kun la urbestro, lia moŝto S-ro Albrecht; kaj dum la mallonga halto ni rapidege interparolis, —tiel rapide ke la honorinda urbestro (kiu venis precipe por aŭdi kiamaniere la fremdulo povus komprenigi sin al loka esperantisto) estis "ŝtonmirigita." De Vinkovce, S-ro Staniŝiĉ vojaĝis kun mi al la bosnia landlimo, kie dum duhora atendado ni kune manĝis kaj li montris al mi la ĉarman urbeton Slavonski-Brod.

De tie mi daŭrigis la vojaĝon suden sola, ĝis la bosnia urbeto Doboj, kie vespere je la 7:30a min atendis en la stacidomo mia malnova amiko kaj korespondanto, S-ro Vojkoviĉ. Ni kune pasigis la horojn ĝis la kvara matene, kiam foriris la rapida vagono al Sarajevo. Ĉe li mi manĝis, en lia ĉarma hejmo, kie lia treege agrabla edzineto estis preparinta por mi bongustan manĝon, kiu konsistis el la specialaj manĝaĵoj de la regiono, kun la konata blanka vino el ĝiaj miloj da vinberejoj. Ĉar mi ne estis dorminta la antaŭan nokton, mi tie ĉi dormis kelkajn horojn, kaj frumatene estis akurate vekita por la vagonaro. Sed antaŭ ol ekdormi tiun nokton, mi havis la plezuron konatiĝi kun malgranda societo da esperantistaj geamikoj, speciale kunvokitaj por la okazo.

De Doboj, S-ro Vojkoviĉ faris kun mi la naŭhoran vojaĝon al Sarajevo, laŭvoje klarigante la multajn interesajn de tiu stranga, bela lando. El Sarajevo li devis pli frue ol mi forveturi hejmen, sed kiam

and convincing manner, to a large and intelligent public. From now on, who can say that Esperanto does not fill the bill as a language for advertising?

Also, as an example of the spirit of Esperanto fellowship, which I experienced everywhere and all the time during the whole journey, I shall tell you about my trip between Belgrade and Sarajevo:

One has to cross over the boundaries twice, in making this journey, and from Belgrade the generous delegate Mr. Andonoviĉ traveled with me to the first boundary to make easy, if there should be need of it, the change of trains, the customs inspections, etc. Afterwards, in Vinkovce, the local delegate Mr. Staniŝiĉ was waiting for me, together with the mayor, his honor Mr. Albrecht; and during the brief halt we hastily conversed, —so rapidly that the worthy mayor (who came chiefly to hear how a foreigner would be able to make himself understood by a local esperantist) was "turned to stone" with astonishment. From Vinkovce Mr. Staniŝiĉ traveled with me to the Bosnian boundary, where during a two-hour wait we dined together and he showed me the charming town Slavonski-Brod.

From there I continued the journey southward alone, as far as the Bosnian town Doboj, where in the evening at 7:30 my old friend and correspondent Mr. Vojkoviĉ was waiting for me. We spent the hours together until four o'clock in the morning, when the fast train left for Sarajevo. I dined with him in his charming home, where his exceedingly pleasant wife had prepared for me an appetizing meal, which consisted of the special dishes of the region, with the well-known white wine from its thousands of vineyards. Because I had not slept the preceding night, I slept there several hours, and early in the morning was punctually awakened for the train. But before going to sleep that night, I had the pleasure of making the acquaintance of a small party of esperantist friends, specially assembled for the occasion.

From Doboj, Mr. Vojkoviĉ made with me the nine-hour journey to Sarajevo, explaining along the way the many interesting things of that strange, beautiful country. From Sarajevo he had to leave for home, sooner than I did, but when I

mi duan fojon trapasis lian urbon Doboĵ, li kun la geamikaro atendis min en la stacidomo, kaj en la dudekminuta manĝhalto ni kune manĝis kaj rapidege paroladis. Malgraŭ tio ke ni estis nur mallongan tempon persone konintaj nin, ni estis kiel fratoj vidante unu la alian je la unua fojo en multaj jaroj. Forirante, li donis al mi kelkajn fotografiaĵojn kiel memoraĵon, kaj diris, "Mia bona amiko, kiu de la malproksima Ameriko skribis ke li vizitos min, kaj jen, li plenumis sian promeson!"

Kaj tia estas la rakonto, necese mallonga, pri unu vojaĝo de urbo al alia, tra Esperantujo. Samajn mi ĉie faras. Kaj mi ĉiutage dankas al Dio ke mi ekkonis Esperanton,—ke mi nun povas sperti kiel granda estas la ideo de esperantismo,—ke mi povas nun ellerni la bonecon de la homoj, de miaj fratoj!

D. E. PARRISH.

passed through his city Doboĵ a second time, he with the group of friends was waiting for me in the station, and in the twenty-minute halt for refreshments we ate together and hastily conversed. In spite of the fact that we had known each other personally for only a short time, we were like brothers seeing one another for the first time in many years. As he was going away, he gave me some photographs, as a remembrance, and said, "My good friend, who wrote from far-away America that he would visit me, and behold, he has fulfilled his promise!"

And such is the story, necessarily short, about one journey from a city to another, through Esperanto-land. I am making the same everywhere. And every day I thank God that I came to know Esperanto,—that I can now realize how great the idea of esperantism is,—that I can now learn the goodness of men, of my brothers!

## A Karavano to Cracow

**S**INCE the "Nordamerika Karavano" to the Esperanto Congress last August at Antwerp found the trip so thoroughly enjoyable, and proved that Americans have now begun to attend international esperantist congresses in considerable numbers,—as well as that they appreciate the pleasures and advantages of travel in the increasingly ubiquitous "Esperantujo" of Europe,—it is proposed to organize, as a "Nordamerika Karavano al la Oka Internacia Kongreso de Esperanto," a similar party to attend the coming congress in Cracow.

The trip to be taken by such a party will be exceedingly interesting, since Cracow is so situated that the most suitable and direct routes thither and back include, as if by special geographical dispensation, the most famous cities in Europe, and some of the very finest scenery. Combined with that portion of "the beaten track" which all one's friends wish to hear described, opportunity is here offered to visit parts of Europe with which it is seldom the fortune of the average tourist to become acquainted.

This becomes evident when we glance at the proposed itinerary: London, Paris, Berne (capital not only of its canton but of the Swiss Confederation), Lucerne (capital of the canton Lucerne), Munich (capital of Bavaria), Salzburg (once the capital of a very rich and powerful ecclesiastical principality), Vienna (capital of the Austro-Hungarian empire), Cracow (the ancient capital of Poland), Prague (capital of Bohemia), Dresden (capital of Saxony), Berlin (capital of the German empire and kingdom of Prussia), Copenhagen (capital of Denmark), and Christiania (capital of Norway).

The reader's imagination and knowledge are doubtless already transporting him to London to the numberless sights and historic spots so peculiarly interesting to the American, in this the greatest commercial city of the world. As for Paris, that gay capital of illimitable and elusive charm, we need only recall the experiences of last year's "karavano," as told in AMERIKA ESPERANTISTO for November, or to listen to the enthusiastic description of some friend or neighbor; for "everybody goes to Paris."

For a first acquaintance with Switzerland, no better city could be chosen than Berne, celebrated for its splendid views of the Alps, which form a magnificent panorama, and against whose white peaks the "alpine glow" can be seen to excellent advantage. Although Berne possesses fine museums, a very handsome Federal Palace, and other modern buildings, it nevertheless retains more medieval features than any other large city in Switzerland; and its odd fountains, and quaint old streets, its oak clock tower, and its bear pits, where the "real live bears," as final emphasis to the innumerable carved wooden, stone and granite bears of all sizes, attest the city's vivid appreciation of its reputed founder. A picturesque ride of between two and three hours leads to Lucerne, "the loveliest city in Switzerland," with lake and mountain scenery of almost incredible beauty. Of course the Lion of Lucerne, by Thorwaldsen, is one of the first sights to be visited here, and stony indeed is the heart of the tourist who can tear himself away without some reproduction of the impressive Lion, whether it be photo, engraving, carving, or still some other medium. The ancient bridges and many towers of Lucerne are another most interesting feature, but the chief pleasure here is really the charming steamer ride down the "Lake of the Four Cantons" (Uri, Schwyz, Unterwalden, Lucerne), unsurpassed in variety as well as in magnificence of scenery, and connected in the minds of all with the story of William Tell, for Schiller immortalized this region. Past the Tell Chapel, past the "Axenstrasse," as far as Fluelen, where the fateful apple was shot off, quite at the end of the lake, and back again past ever-varying views of mountain peaks, the trip is surely the acme of esthetic pleasure. From Lucerne the would-be mountain climber is tempted by the Rigi, or, if he is more ambitious, by sterner Pilatus, whose bleak summit offers abundance of eternal ice and snow, and from which the view is very impressive. The mountain railway up the Rigi and Pilatus, as well as on other nearby peaks, have brought mountain-climbing within the power of all nowadays.

From Lucerne on through the sturdy commercial town and University center Zurich, to the shores of blue Lake Constance, where a pleasant variety from the preceding three hours of railway is the steamer ride to Lindau, on an island connected with the mainland by a long wooden bridge and railway embankment. This is the terminus of the Bavarian Railway, whence the four hour express hastens its passengers to the great art center and busy metropolis, Munich. Here there are not only famous galleries to be visited, but palace and park and monument beside, while the life itself of this noted city furnishes abundant "human interest" for every visitor.

The next point of arrival is Salzburg, picturesquely situated in the Austrian Tyrol, on both sides of the Salznach, with pleasant promenades along this winding river. Though proud of its beauty and of its attractive views to be gained from almost every point, perhaps most ardently the city cherishes the memory of Mozart; for Salzburg was the birthplace of the great musician, to whom honor is shown by statue, museum, and other tributes.

Vienna, one of the greatest cities in Europe, and the favorite of most experienced travelers, can hardly be described. Parks and picture galleries again vie with each other in attracting the visitor, while the Ringstrasse, lined with impressive buildings and monuments, compares favorably with the most dignified chief street of any European city. But it is the Viennese atmosphere, the realization of wonderfully cosmopolitan Vienna, which make this great pulse-center so fascinating, and it is with regret that one departs, even though en route for a spot of such peculiar interest as the next destination.

Finally the congress-city, Cracow, where many a proud Polish king was crowned in days gone by. Aside from the pleasures of the Eighth Congress, Cracow is itself a city well worth seeing, with its towers and ancient castle and charming promenades; while doubtless there will be excursions to Kosciuszko Hill, for the fine view as well as the historic associations; and also to the noted salt mines, in some of whose vast depths

are chapels with altars and statues hewn from the rock salt, where mass not only could be but really is celebrated. That the stay in this city of oriental atmosphere will be more interesting than any Esperanto Congress has yet afforded, and that it will be especially attractive to congress-members from the New World, we are already assured by an American esperantist who has just been there and had opportunity of making sure,—if indeed we need any such assurance to prove that. And yet, there is still an additional point worthy of consideration, for all previous congresses have been easiest of access to English, French and German esperantists,—the three nations who are most akin to Americans, and best known to us. But Cracow's geographical situation does not offer such favoritism to Teutonic, Italic and Celtic nations, even though we know that they will be abundantly represented. It is a congress city which can attract a large proportion of its attendance from Slavic and southeastern countries, and we may expect many esperantists from the regions whose peoples are little known to Americans.

After the Congress, the next city to be visited is Prague, rich in historic associations, picturesquely situated, and boasting many odd and medieval buildings. What is now its finest and busiest street was once the moat, curving around to meet the river. One of the bridges across the river, adorned with nearly thirty statues or groups of statues, is connected by an interesting legend with the city's patron saint, and is visited yearly by thousands of pilgrims, in addition to the tourists who, of course, include this among the sights they wish to see.

The name of Dresden recalls the extremely successful Fourth Esperanto Congress, which found hospitable welcome here. To the sight-seer, Dresden means one of the finest art galleries in the world, one of the great collections of jewels, in the Green Vault, and a noteworthy collection of porcelains, as well as many other interesting things. Only

three hours away lies Berlin, not only of great political and commercial importance, but exceedingly attractive to the visitor, with stately Unter den Linden on through the Brandenburg Gate and into the beautiful Tiergarten; with numerous museums and public buildings and palaces, and crowned by an excursion to Potsdam, which rivals Versailles in more ways than one,—and comparison with Versailles is no mean praise.

By rail, by steamer and then by rail again, Germany is left behind for Denmark, with Copenhagen as the goal. Many features of interest are to be noted here, as well as excellent museums, some important art collections, and other points which space forbids enumerating. The last glimpse of Copenhagen will be from the deck of the steamer, sailing northward through the Sound past Elsinore, while reminiscences of "the melancholy Dane" mingle with more vivid thoughts of the sights just seen; for a while the coast of Sweden is clearly visible on the right; then finally through the great fjord to Christiania, where opportunity will be given for some last sight-seeing, the Viking ships, the tomb of Ibsen, the palace and Parliament being among the chief attractions of this modern city, which nevertheless bears the impress of a past century.

Next the route lies southwest, through ever-shifting scenery, equally majestic whether seen in broad daylight, or by the midnight sun, to Christiansand, where a stay of only a few hours is made, and then out past the Orkney Islands, and finally upon the ocean highway to New York.

*(All who contemplate joining the "Karavano" described above will please communicate at once with the Esperanto Office, Washington, D. C., both to receive further information concerning details, and to make possible an early estimate of the exact number for whom plans should be made. Because of the probable dates of departure and return, steamer reservations will have to be made rather definitely at a much earlier date than would ordinarily be necessary.)*

## Foreign News

GERMANY.—Steady progress is evident throughout the empire. The Chamber of Commerce of Hanover has made a financial appropriation for the support of Esperanto in the public schools. In Anhalt Esperanto has been made a compulsory subject in the curriculum of the Friedrich-Technikum. In Schöneberg Esperanto has been admitted to the school curriculum. In Magdeburg there are four Esperanto courses in Commercial Unions, one of Good Templars, and two in commercial schools, in addition to the usual courses carried on by the seven Esperanto groups in the city. In Dresden an Esperanto library and museum has been placed in the House of Parliament, as the property of the kingdom. The "Deutsche Warte" of Berlin continues to give a good part of one page to material in and about Esperanto.

SPAIN.—In Barcelona the important newspaper, *La Publicidad*, still devotes part of its space to an Esperanto department every Thursday. A number of other important papers in this same city have also given much attention to Esperanto lately. The learning of Esperanto was also recommended at the recent Labor Congress here.

RUSSIA.—The Esperanto Society in Moscow reports excellent progress, also mentioning the fact that it has at one time or another during the past year entertained over fifty esperantist visitors from other cities and countries. The Esperanto Institute in the same city is conducting seven courses in the language. In Narva a new group has been established, with sixty-six members.

SIBERIA.—The Esperanto section of the recent Western Siberia Exposition proved a great success, much interest in the language being aroused, and many text-books bought as a result. Students in the gymnasiums were especially interested. All of the Esperanto publishing centres which contributed material to this exposition (including the American Esperantist Company) may therefore feel well pleased.

CHINA.—Shanghai is reported to have a new group of thirty members. The interesting daily, the *Pekin Daily News*, published partly in Chinese, partly in English for the benefit of the local English population, gave a column and a third on its editorial page to a report of the congress at Antwerp, and an editorial discussion of the probable stability of the language.

JAPAN.—The Japanese labor paper in Tokio printed the rules of the Japanese labor union in both the Esperanto and Japanese languages.

MEXICO.—We are glad to announce the reappearance of a Mexican propaganda magazine, *Esperanta Gazeto*, published at Guadalajara. The greater part of the magazine is in Spanish. Subscription, 75 cents per year.

CUBA.—A report of the Esperanto Congress at Antwerp was recently published in *El Correo*, of Havana, on the front page of the paper. There are four Esperanto clubs on this island. Colon has a new group, and also a "Librejo" called the "Verda Stelo."

BRAZIL.—A paper in Bahia is publishing an Esperanto course, together with news of the movement. The "Association of Commercial Clerks" in Rio de Janeiro has a class of forty-six members who are most enthusiastically studying the language. A general increase of Esperanto activity is evident.

PERU.—Senator Cesar del Rio has proposed in the senate a law making the study of the language obligatory in the commercial schools of Peru.

FRANCE.—At the last convention of the Paris group were delegates from the *Société nationale d'Encouragement au Progres* and the *Société Nationale d'Encouragement civique*, who not only spoke favorably for the auxiliary language, but agreeably surprised the majority of those present by giving medals of honor to the group's two most fervent propagandists.

ENGLAND.—The just retired Lord Mayor of London, in the course of a speech before the London Esperanto

Club, stated that during his recent visit to Vienna he was besieged by people speaking the new idiom; that the experiences of his trip show that Esperantists everywhere entered into the spirit of brotherly regard without distinction of race or language.

HOLLAND.—At Rotterdam has been founded the "Netherland Association of Rail Road and Street Car Esperantists."

NORWAY.—The *Norvega Esperantisto* again appears after a seven months' intermission.

AUSTRIA.—In Budapest plans are well under way for the Third Esperantist Catholic Congress, to occur next August, also for a general pre-congress to show hospitality to all esperantists who pass through Budapest en route to the Eighth Esperanto Congress, or who can arrange to visit the city at that time. Inasmuch

as the city government supports several Esperanto classes, and the national propaganda society of Hungary has some 2,500 members, it is evident that the region is becoming well "esperantized."

During the late visit of the English squadron to Trieste, Mr. W. Small, chief wireless telegrapher on the admiral's ship, was a guest of the local "samideanoj." So pleased was he to find such good friends in a strange land, that during the presence of the ships he passed with them his free hours ashore, and in turn entertained them on board the flagship. Mr. Small proved that Esperanto is well worth while, if for no other reason than to gain friends in foreign cities.

EGYPT.—A national society has been formed under the name, "Egyptian Esperanto Society."

## Kroniko Nordamerika

*(Ni petas la lokajn sekretariojn, distriktajn sekretariojn kaj ankaŭ konsilantojn, ke ili sendu al la redaktoroj plenajn raportojn pri la progreso de la Esperantista Movado en siaj urboj distriktoj kaj apartaĵoj, antaŭ la 20a de ĉiu monato.*

*Ni ankaŭ petas individuojn, ke ili sendu, antaŭ la 20a de ĉiu monato, sciigojn pri artikoloj en ĵurnaloj, paroladoj, intervjuoj, ekstarigo de klasoj kaj grupoj, kaj ĉio alia interesa.*

*Car la novaĵoj en "Kroniko Nordamerika" estos plej precizaj se la informo pri ĉio venas rekte el la koncernata loko, ni esperas ke la esperantistoj donos specialan atenton al ĉi tiu peto. Bonvole skribu komunikaĵojn por ĉi tiu fakto de AMERIKA ESPERANTISTO sur apartaj paperoj, ne en leteroj pri mendoj, abonoj, k. t. p.)*

PORTLAND, ME.—La societo (D-ro Dana Willis Fellows, prezidanto, S-ro Herbert Harris, sekretario) dufoje kunsidis depost la somera libertempo, kaj nun aranĝas la kutimajn vintrajn kursojn.

CAMDEN, ME.—La vendado de lernolibroj ĉi tie montras ke La Afero bone progresas en nia regiono.

GREENLAND, N. H.—Esperanta klaso de ok anoj, instruita de F-ino Lois D. Beck, ekzistas ĉi tie, kaj faras bonan progreson.

MONTPELIER, VT.—La Esperanta libraro, metita en la Kellogg-Hubbard bibliotekon antaŭ kelkaj monatoj, ne restas sufiĉe netuŝata por kolekti polvon! Ĉiu el la libroj estas kelkfoje prunteprenita.

Klaso da sinjorinoj, kaj du klasoj da sinjoroj, nun kunvenas dufoje en la semajno, por studi Esperanton. La so-

cieto kiu estas oficiala parto de la E. A. de N. A., jam havas deknaŭ anojn. La lokaj ĵurnaloj multe favoras la Movadon, donante spacon volonte al artikoloj kaj novaĵoj pri Esperanto; kaj pro la propaganda laboro de S-ro John L. Stanyan, depost lia reveno de la Sepa Kongreso de Esperanto, la publiko des pli interesigas je la lingvo. S-ro Stanyan ĵus dissendis al la katolikaj pastroj en la ĉirkaŭajo kopiojn de la "Deziresprimoj aprobitaj" voĉdonitaj je la Dua Katolika Kongreso kiu okazis antaŭ la Sepa.

BARRE, VT.—La "Cosmopolitan Club," organizita la pasintan someron, nun preparas por sia vintra laborado. Kvin el la klaso jam korespondas kun alilanduloj, kaj sin pretigas por la ekzamenoj por atingi la "Ateston pri Lernado" de la E. A. de N. A.

La Aldrich' publika biblioteko nun



enmetas esperantan libraron, por la uzado de siaj legantoj, kiuj deziras sin informi pri Esperanto.

LONDONDERRY, VT.—Pro la klopodo de S-ro George Lackey, la ĉi tieaj esperantistoj estas organizantaj klason, por kunveni ĉiusemajne dum la venonta vintro.

SWARTHMORE, PA.—Oni ĵus starigis Esperantan klason inter la studentoj de Swarthmore universitato. Jam dekdu personoj abonis al AMERIKA ESPERANTISTO, kaj la nombro de la klaso ĉiam pligrandigas. S-ro Raymond T. Bye instruas unu klason, kaj verŝajne oni baldaŭ komencos alian klason, kiun instruos S-ro Horace C. Jenkins.

BALTIMORE, MD.—La naŭan de novembro komenciĝis Esperanta klaso ĉe la Normala Lernejo, instruata de F-ino E. W. Weems. Post parolado ĉi tie de S-ro Reed, sekretario de la E. A. de N. A., antaŭ proksimume unu jaro, la estraro de la lernejo decidis proponi la uzadon de unu el la lernoĉambroj por tia klaso; kaj kiam F-ino Weems revenis de la Sepa Kongreso en Antverpeno oni invitis ŝin paroladi pri Esperanto al la instruistaro de la lernejo.

WASHINGTON, D. C.—La kunvenoj de la "Washington High School Esperanto Club" farigas ĉiusemajne pli agrablaj kaj sukcesplenaj. Novaj anoj aniĝas je ĉiu kunveno, ricevante la lernolibron kiu estas donita de la klubo al ĉiu ano tuj kiam la klubkasisto ricevas ties enirpagon. Ni starigis du klasojn, unu por komencantoj, instruitan de Robert Bruce, el "Western High," kiu estas vicprezidanto de la klubo; la alian klason, por la pli spertaj, instruas Charles E. Nickles, prezidanto de la klubo, kiu nun estas studento en George Washington universitato. Ambaŭ instruantoj montras sin kompetentaj, kaj la klasoj bone progresas. Je la deksepa de novembro la klubo havis feston, ĉe la hejmo de C. E. Nickles. Ĝi estis grandega sukcesa, montrante la dezirindecon de aniĝado en klubo kiu havas duoblan celon,—propagandon de Esperanto, kaj plezuron por la anoj. Dudek ses gejunuloj ĉeestis, ankaŭ niaj honoraj anoj, Ges-roj Reed. Post ludado de diversaj ludoj, oni ĝuis bonegan manĝeton de kremglaciaĵo, kukoj, sukeraĵoj kaj fruktoj, en la man-

ĝoĉambro, kiu estis speciale ornamita per esperantaj standardoj, k. t. p. Tiom la klubo ĝuis la aferon, ke espereble tiaj festoj okazos ofte de nun.

Ce la Ingraham Memorial Church estis aranĝata Esperanta Diservo por la unua dimanĉo de decembro, je la kvara posttagmeze. Oni esperas ke tia Diservo povos esti aranĝata por ĉiu unua dimanĉo de la monatoj.

RUSKIN, FLA.—Klaso de dek du anoj estas starigita ĉi tie, pro la klopodoj de S-ro A. D. Miller. Oni uzas la "American Esperanto Book," kaj ĉiu ano jam abonis al AMERIKA ESPERANTISTO.

CLEVELAND, O.—Novaj esperantaj klasoj estas antaŭ nelonge starigitaj en la diversaj urbaj bibliotekoj. Speciala klaso de pli spertaj esperantistoj kunvenas ĉiusemajne en Hough biblioteko, instruata de S-ro Emil Karpowski.

HAGERSTOWN, IND.—Klaso kiu jam konsistas el sep anoj estas nun starigata, per la sindonema laboro de S-ro R. C. Small, kiu antaŭ unu jaro estis la sola esperantisto en la urbeto. La klaso intencas baldaŭ pligrandigi la nombron da abonantoj al AMERIKA ESPERANTISTO en sia regiono.

MORGANTOWN, W. VA.—Vigla klubo nun ekzistas ĉi tie, kiel rezulto de bona uzado de la kongresa numero, sub la direktado de S-ro Addison A. Clarke, kaj malavara kunlaborado de loka tagjurnalo. S-ro Clarke aranĝis kunvenon, ĉe kiu paroladis S-ro H. I. Keyes el Uniontown, Pa., pri siaj travivaĵoj ĉe la Sepa Internacia Kongreso de Esperanto; kaj je la fino de la parolado ĉiu aŭdanto sin enregistris en la klubo.

OMAHA, NEB.—Dum la tutsemajna kunveno de ŝtataj lernejoj instruistoj montriĝis ekspozicio de Esperantaj libroj, k. t. p., en montra fenestro de unu el la plej grandaj magazenoj de ĉi tiu urbo, dank' al la influo de S-ro C. J. Roberts.

NORTH PLATTE, NEB.—P-ro E. H. Flowers instruas klason de Esperanto en la Alta Lernejo, en unu el la horoj de la lerneja horaro. Kvankam la lernantoj ne ricevas "krediton," la klaso bone sukcesas.

VALE, ORE.—Kiel rezulto de parolado pri Esperanto, donita de Juĝisto J. D. Flenner el Boise, Idaho, estas raportita la fondado de klubo por studi la lingvon.

# Official Communications

Sub ĉi tiu rubriko la redaktoroj volonte presigos komunikojn de ĉiu esperantista societo, kiu havas inter nia legantaro sufiĉe da anoj aŭ kies speciala fako de laboro interesos niajn abonantojn.

## The Esperanto Association of North America

Central Office: Washington, D. C.

### THE ANNUAL MEETING.

At the invitation of the New England Esperanto Association and the Boston Esperanto Society, the General Council of THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA has decided to hold the annual meeting of 1912 in the historic city of Boston, Mass. The date has not yet been definitely set, but by vote of the Council it is to be fixed so that those sailing for the Eighth International Esperanto Congress in Cracow may first attend the Boston meeting. Since New England contains more Esperantists on record than any other district and since the Boston Society is one of the largest, the program on which they have already begun to work ought to be one that will bring a large attendance.

### ESPERANTO HERALD No. 11.

The November number of the ESPERANTO HERALD is an attempt to respond in a small space to the many questions asked by inquirers. It is called "General Information about Esperanto." Single copy sent for two-cent stamp. In quantities for distribution, ten for twelve cents, twenty-five for twenty-five cents. One copy of the ESPERANTO HERALD is sent free each month to each member of the ASSOCIATION.

### TREASURER'S ACCOUNT.

#### NOVEMBER RECEIPTS.

Cash on hand Nov. 1, 1911-----	\$15.87
Membership fees -----	54.65
Sustaining Membership fees----	41.00
Examinations -----	.10
Contributions -----	.50
Sale of Heralds -----	.15
	<hr/>
	\$112.27

### EXPENDITURES.

Postage -----	\$10.75
Printing -----	22.50
Editor form letters-----	8.25
Assistants -----	18.00
Rent of office-----	7.50
Repaid E. C. Reed on acct. loan--	40.00
Balance on hand Nov. 29, 1911--	5.27
	<hr/>
	\$112.27

### FORIRO DE DRO. YEMANS.

Multe ni bedaŭras sciigi al la usona esperantistaro ke Dro. Yemans, la vicprezidanto de la ESPERANTISTA ASOCIO DE NORDA AMERIKO foriros de Usono, je la dekdua de decembro, al la Filipinaj Insuloj pro siaj militaj devoj. Nia perdo sendube estos la gajno de nia samideanaro filipina, al kiu ni kore gratulas.

### EDZIĜOJ.

Edziĝis la naŭan de novembro nia bone konata samideanino, Fino. Mary Alice Robbins el Portland (Me.), kun Sro. William Converse Tapley. Ĉiam bondezirojn al ili! Post la unua de januaro ili estos "ĉeĥejme" ĉe 13 Eastern Promenade, Portland, Me.

Inter alilandaj edziĝoj, amerikaj esperantistoj estas speciale interesataj pri tiu de Sro. Mann, bone konata al ĉiu ano de la Sesa Kongreso, kun Fino. McCarthy; ankaŭ pri la edziĝo de Sro. Privat, kiu antaŭ kelkaj jaroj kiel junulo vizitis ĉi tiun landon.

### NOVAJ ESPERANTISTETOJ.

Naskiĝis al Gesinjoroj John A. Kelsey, 14an oktobro, 1911, John Daintree Kelsey; naskiĝis al Gesinjoroj Ross L. Stevens, 21an oktobro, 1911, Ross Lewis Stevens, Jr. Oni esperas ke ili ambaŭ fariĝos anoj de la fervora esperantistaro de Portland, Maine.

## *Esperanto and the Press*

Since the last issue of AMERIKA ESPERANTISTO, the following newspapers and magazines have made favorable mention of Esperanto:

THE MALHEUR ENTERPRISE (Vale, Oregon): Three separate articles, well headlined, in conspicuous location.

THE KIRKSVILLE DEMOCRAT (Kirksville, Mo.): A long well-headlined article, describing the growth of Esperanto, with special allusion to the prominence of Esperanto at the Christian Endeavor convention in Nebraska, also later articles.

THE ANACORTES AMERICAN (Anacortes, Wash.): A three-column article, containing translation into English of interesting letters from a Russian correspondent, discussing the possibilities of foreign invasion confronting the United States (Translation made by Mr. F. F. Zent, recipient of the letters).

BULLETIN OF THE ORIENTAL ESOTERIC CENTER (Washington, D. C.): A depart-

ment of Esperanto news has been opened in this monthly, to be a regular feature henceforth.

THE EPWORTHIAN (Minneapolis, Minn.): A loose-leaf supplement, containing a synopsis of Esperanto grammar, etc. This is the basis of a series of lessons which will probably be prepared for the magazine by Mr. C. H. Briggs.

THE TRYON BEE (Tryon, N. C.): A column report of the Eighth Congress.

THE EVENING EXPRESS (Portland, Me.), frequently opens its columns to news of the Esperanto movement, as do also the two morning papers of this city.

THE COMMERCIAL REVIEW (Portland, Ind.), has called the attention of its readers to "House Resolution 220," concerning Esperanto.

THE CHRISTIAN ENDEAVOR WORLD (Boston, Mass.), gave satisfactory reports concerning Esperanto in connection with the recent state convention in Nebraska, in its issues of October 26 and November 27.

## *Esperanto je Kristana Celado*

OKAZE DE GRAVA KUNVENO EN LA STATO NEBRASKA.

**G**RE kontentigan atenton ricevis Esperanto, la Internacia Lingvo, ĉe granda kunveno en Lincoln, Nebraska, la 26an-29a de oktobro, de la Kristana Celada Unuiĝo de Nebraska. Des pli grava estis la kunveno pro tio, ke la Unuiĝo samtempe festis sian dudek kvinan jubileon.

La luksaj programoj, enhavantaj kvindek du bele presitajn paĝojn, kun portretoj de oficistoj kaj paroladontoj, donis multan spacon al Esperanto, anoncanta pri diversaj esperantistaj kunsidoj, klarigante en speciala paragrafo la karakteron kaj celon de la lingvo mem, montrante la tutan Ordon de Diservo por la dimanĉa esperanta Diservo, kaj atentigante pri la ekspozicio de esperantaj libroj, ĵurnaloj, poŝtkartoj, k. t. p.,

kiu troviĝis en unu el la kunvenoj dum la tuta daŭro de la kunveno, kaj kies sukceson oni multe ŝuldas al la sindonema kaj fervora laborado de Sro. C. J. Roberts kaj Pastro C. P. Lang.

Krom la Diservo, okazis du specialaj konferencoj kie oni klarigis pri Esperanto rilate al iuj fakoj; kaj el la dek unu temoj por pri-traktado en la "horoj por konsultado," unu estis Esperanto. Tial, ni povas konстати ke la Unuiĝo, kies kunvenon ĉeestis pli multaj ol 1200 delegitoj, sentas grandan simpatian al la Internacia Lingvo.

Antaŭ kelkaj monatoj, Sro. Ray G. Hulburt, estro de la misia fakto de la Unuiĝo, komencis prepari esperantan fakon de la kunveno, samtempe skribinte al du-tri eŭropaj ĵurnaloj pri la afero.

Sekve, ĉe la kunveno, li povis pruvi la utilecon de Esperanto, per salutoj ricevitaj de kristanaj personoj kaj organizaĵoj en multaj landoj. Plej grava el ĉiuj estis eble letero skribita de Paul Hubner (redaktoro de "Dia Regno") laŭ aŭtoritato de la konferenco de kristanoj je la Sepa Kongreso de Esperanto. Traduko de tiu letero poste aperis en la "Christian Endeavor World" (Kristana Celada Mondo), la 26an de oktobro, kun artikolo kiu diris ke tia saluto estas "kred-eble unika en la historio de Kristana Celado, kaj eĉ de kristanismo mem." Krom tiu, estis tri salutoj el Anglujo, du el Germanujo, du el Hispanujo, du el Bohemujo, kaj saluto el ĉiuj jenaj landoj: Norvegujo, Nederlando, Svisujo, kaj Hungarujo. Ankaŭ estis montrata letero de belgo, kiu petis raporton pri la kunveno, por ke li povu paroli pri ĝi en rondiraj paroladoj, kiujn li intencas fari inter la belgaj K. U. J. V. dum la venonta vintro. Ĉe la ekspozicio estis ankaŭ montritaj leteroj de diversaj eminentuloj, en aŭ pri Esperanto. Unu precipe interesan leteron sendis Helen Keller, la fama blindsurdulino, bone konata pro sia klereco kaj instruiteco, kiu skribis ke ŝi ne nur interesigas pri Esperanto, sed eĉ posedas esperantajn librojn. Estroj de diversaj fakoj en la usona registaro ankaŭ skribis favorajn leterojn, ĉiu pritraktante Esperanton de sia propra profesia vidpunkto. Rilate al ĉi tio, estas interese ekscii ke la propaca societo de la ŝtato Massachusetts, kiu nun serioze esploras pri uzado de Esperanto, petis ke Sro. Hulburt (kiu posedas la leterojn, kaj speciale raportis pri ili en tagjurnalo de Kirksville, Mo.) prunte donu tiujn leterojn al la societo, por presado en venonta broŝuro.

La Diservo estis la granda okazo de la serio. Ĉiu ĉeestanto ricevis kvarpaĝan folieton, kiu enhavis la tutan Ordon de

Diservo por tiu dimanĉo. Sur la unua paĝo aperis emblemo desegnita de Sro. Hulburt, proponata de li kiel daŭra emblemo de kristanaj celadistoj. Ĝi estas la Esperanta stelo, trapikita de la kristana kruco, kun la literoj K. C. kaj la devizo "Pro Kristo kaj l'Eklezio."

Je la muziko de la Diservo, kiun Sroj. Hulburt kaj Roberts speciale estris, helpis tri aliaj sinjoroj. Predikis Pastro Chas. P. Lang, pri la temo "Ĉiam antaŭen," je la teksto: Ĕksod. 14:15, "Diru al la Izraelidoj ke ili antaŭeniru." La preĝojn preĝis Pastro J. R. Bennett. Inter la ĉeestantoj sin trovis multaj instruistoj, kiuj deziris sciigi pri Esperanto; ĉeestis ankaŭ la helpa estro de la ŝtataj lernejoj, kiu tiel profunde interesigis ke li aranĝis gastigi Pastron Lang, por pli detale informigi, kaj samtempe aĉetis lernolibron.

La ĉiutagaj ĵurnaloj de Lincoln (ĉefurbo de la ŝtato) kontentige raportis la diversajn kunvenojn kaj priskribis la ekspozicion, eĉ presigante la tutan ordon de la Diservo, kun la speciala, facile memorebla traduko de la Patro Nia, farita por tio. Aliaj ĵurnaloj en la ŝtato kaj ankaŭ en apudaj ŝtatoj, donis simile longajn raportojn. Tial, sendube ne nur la Nebraska Esperantista Asocio, sed ankaŭ la ĝenerala organizaĵo de kiu ĝi estas parto, nome la Esperantista Asocio de Norda Ameriko, ricevos el Nebraska kaj aliaj ŝtatoj multajn petojn por informo, kaj povos pro tio ankoraŭ disvastigi sciigon pri Esperanto. Certe estas, ke la fervoraj esperantistoj de Nebraska, spite sia ĝis nun malgranda nombro semis bonegan semon. Sekve, ni rajtos diri, kun vigla espero, ke en tiu regiono "vivu, kresku kaj floru nia afero!"

*Jen ĵus ricevita informo: La estraro de la Nebraska Kristana Celada Unuiĝo ekdecidis starigi daŭran esperantistan fakon! Bonega komenciĝo!*

"Pro Kristo kaj l'Eklezio"



## For the Beginner

*In what cases are underived adverbs given an additional -e, as "tiele," "baldaŭe," etc.?*

To add -e is to derive an adverb, from whatever form taken as a basis. The result must be a real derivation, that is, have a meaning or grammatical character different from that of the foundation-word. Herein lies the test. If a word of new significance results, the addition of -e to an underived (i. e., primary) adverb is correct. If not, then it is hard to see any excuse for burdening the original word with meaningless additions. If "tiele" and "baldaŭe" mean the same as "tiel" and "baldaŭ," they may be considered undesirable Esperanto, reminding us of the facetious "thusly" for "thus." So also in the case of "ĉiame," "nune," etc. Obviously correct formations are to be seen in "plie," further-

*more, moreover, from "pli," more; "jene," as follows, from "jen," thus; "jese," affirmatively, from "jes," yes, etc.*

*How do you say in Esperanto "Two and a half miles?"*

The expression quoted is really an abbreviation for "two miles and a half (of a mile)," which may be translated literally into Esperanto:

Du mejloj kaj duono da mejlo (the addition of the last two words being optional, as in the English).

Mi studis tri horojn kaj duonon, *I studied three hours and a half (three and a half hours).*

Mi deziras funton kaj tri kvaronojn, *I wish one and three quarters pounds.*

Tio estas longa proksimume je metro kaj kvinono, *that is about one and a fifth meters long.*

### KRISTNASKA MIRAKLO.

Estas malluma, malgaja, venta nokto—kristnaska vespero. Jen la deka horo en malbone lumigata tramo; tro frue por la amasoj el la teatroj; tro malfrue por ĉiuj, escepte de malmultaj aĉetantoj de donacoj; tial la vagono ne estas plenigita, kvankam ĝi enhavas multe da malfreŝa aero, restanta de la kunpakitaj aroj kiuj en ĝi veturadis la tutan tagon.

Kiel lacigita kaj malafablega ĉiu aspektas! La kondukto apenaŭ povante stari pro laceco, malgaje disdonas transpagilojn; la tre malmultaj viraj vojaĝantoj estas kvazaŭ internigintaj en la supervestojn, kun la ĉapeloj malsupren tiritaj. Grasulino, funebre rigardante rekten, kun la buŝo malsupren kurbita je l' anguloj, aspektas preta por ekplori; kaj la juna italano, leganta italan ĵurnalon, havas malspritan mienon; la fanfara vento muĝegas ĉirkaŭ la rapidanta tramo. Efektive ne ŝajnas kiel la nokto antaŭ kristnasko!

### A CHRISTMAS MIRACLE.

It was a dark, gloomy, windy night—Christmas eve. Now ten o'clock in a poorly lighted street car; too early for the throngs from the theatre; too late for everybody, with the exception of scattered buyers of gifts; therefore the car was not filled, although it contained a good deal of bad air, remaining from the packed crowds which had been traveling in it the whole day.

How wearied and glum everybody looks! The conductor, hardly able to stand because of fatigue, gloomily distributes transfer tickets; the very few masculine travelers are, so to speak, buried in their overcoats, with their caps drawn down. A fat woman, mournfully gazing toward the right, with mouth drawn down at the corners, looks ready to burst into tears; and the young Italian, reading an Italian paper, has a dull appearance; the boastful wind howls around the hurrying trolley. Really it does not seem like the night before Christmas!

Subite la malbonaj lumigiloj fariĝas pli helaj; la pasaĝeroj rektiĝas; la laca konduktoro ridetas; la dika sinjorino penas suprenigi la malgajajn angulojn de sia buŝo, aperigante strangan, kompatindan rideton. La juna italano, en la ĉifonita supervesto, vere radiiĝas en ia revo, elpuŝante la pinton de la lango inter siaj lipoj, dum liaj okuloj gaje brilas. La kaŭzo de ĉies ekĝojo estas malgranda infano.

Li estas vestita en blua supervesteto kaj blankaj gamaŝoj, kaj sur la kapo estas blanka trikotita ĉapeto. Dum la patro lin portas tra la koridoreto, li timete ridetas al ĉiuj. Sidante sub la protektanta brako de la patro, li gravmiene rigardas laŭvice ĉiun vojaĝanton, kaj kiam ajn ridetas iu al li, sulketiĝas en silenta ridado la roza vizaĝeto de l' infano, kiu tiam sin kaŝas post la supervesto de la patro. Kiam li ree elrigardas, liaj helaj okuletoj elbrilas ruze sub la ĉapo malordigita.

La atmosfero de la tramo ŝajnas tute malsama, la pasaĝeroj rigardas la malgrandulon, kaj tiam ridetante reciproke sin rigardas. La malluma, nuda interno ŝajnas luma kaj preskaŭ festa, kaj la vento nun gaje fajfas. Senintence la infano estas farinta miraklon, kaj alkondukinta la ĝojon kristnaskan. Forirante el la vagono, rideme kaj amike ĉiu salutas la ceterajn per "Gaja kristnasko."

WILDER H. HAINES.

Suddenly the wretched lights become brighter; the passengers straighten up; the tired conductor smiles; the stout lady tries to lift the unhappy corners of her mouth, causing a strange, pitiful smile to appear. The young Italian, in the ragged overcoat, actually becomes radiant in some sort of vision, thrusting out the tip of his tongue between his lips, while his eyes shine gaily. The cause of every one's sudden joy is a small child.

He is clothed in a little blue overcoat and white gaiters, and on his head is a little white knitted cap. While his father is carrying him through the aisle, he timidly smiles at every one. Sitting beneath the protecting arm of his father, he solemnly looks at each passenger in turn, and whenever any one smiles at him, the rosy visage of the child wrinkles up into a silent smile, and he then hides behind his father's overcoat. When he looks out again, his bright little eyes gleam roguishly beneath the disordered cap.

The atmosphere of the car seems absolutely different, the passengers look at the little one, and then smilingly exchange glances. The dark, bare interior seems light and almost festive, and the wind now whistles merrily. Unintentionally the child has wrought a miracle and brought the Christmas joy. As they leave the car, every one in a smiling friendly manner salutes the rest with a "Merry Christmas."

#### KELKAJ VORTOJ PRI SAPO.

Kiu sin lavas, sin beligas,  
Kaj la mondon li riĉigas.

El ĉiuj elpensajoj kiuj feliĉigas la vivon, kaj riĉigas la mondon, la sapo, laŭ mia opinio, estas la ĉefa. Kiam oni ekkomprenas kiel malfeliĉa li estas kiam la manoj estas malpuraj, oni tuj povus nomi la sapon unu el la plej gravaj elpensajoj en la mondo. Tamen, ni ĉiuj uzas sapon ĉiutage, ne pripensante ĝian grandan utilecon; kaj se la sapo mankas al ni, tuj ni fariĝas koleraĵ.

Oni malmulte scias pri la historio de sapo. Estas certe ke la romanoj kaj gal-

#### SOME WORDS ABOUT SOAP.

Who washes himself, improves his looks,  
Enriching this globe's remotest nooks.

Of all inventions which make life agreeable, and enrich the world, soap, according to my opinion, is the chief one. When one stops to realize how unhappy he is when his hands are dirty, he could immediately call soap one of the most important inventions in the world. However, we all use soap daily, not thinking of its great utility; and if we are without soap, we at once become indignant.

We know little concerning the history of soap. It is certain that the Romans

loj ĝin uzis, sed ne estas klare kion oni havis antaŭ tiu tempo. Eble oni uzis unu el la multaj kreskaĵoj kiuj havas sapan econ, aŭ eble la antikvuloj nur batis la vestojn per bastonoj, ĉe la riverbordoj, same kiel la sovaĝuloj de la nuna tempo.

La fabrikado de sapo kiel komercaĵo unue komenciĝis en Marseljo kaj Genovo, sed ne laŭ tre scienca metodo. En la jaro 1791, Sro. leBlanc, kemiisto, sciigis la mondon pri sodo, kiun de tiam la sapfabrikistoj uzadis en la sapfabrikado. En la jaro 1823, alia kemiisto, Sro. Cheuvreul, sciigis la mondon pri animala graso, kaj lia disertacio tiel klarigis la aferon, science kaj komercie, ke la fabrikado de bonkvalita sapo efektive komenciĝis de tiu tempo, kaj ankoraŭ restas preskaŭ sama.

En preskaŭ ĉiu urbo troviĝas statuoj de homoj kiuj faris ion por la mondo, eĉ ofte de homoj kiuj faris nur malmultan bonon. Nenie, tamen, troviĝas statuo por honori la elpensinton de sapo! Estas vere ke iaj sapoj ĉiam ekzistis, sed ili estis nur laŭnaturaj, kaj ne tre utilaj, ĝis kiam Sinjoroj leBlanc kaj Cheuvreul donis al la mondo la profiton de siaj eltrovoj, kaj ebligis la fabrikadon de la bona utila sapo, kiun ni hodiaŭ konas. Ĉu la mondo ne sin honorus, honorante tiujn du kemiistojn? Efektive, ĉiu urbo devus konstrui statuon por honori tiun ĉi eltrovon! La statuo rememorigus nin pri la ŝuldo, kiun ni certe ŝuldas al la sapo, kaj sendube estus bonega ekzemplo al la infanaro de nia lando, kaj helpo al la paciencaj vartistinoj, kiuj devas ĉiutage klarigi al la infanoj kial estas konsilinde lavi la manojn, lavi la vizaĝojn, kaj zorgi pri la sape purigitaj vestoj!

N. S. GUIMONT.

and Gauls used it, but it is not clear what was used before their time. Possibly people used one of the many vegetable growths which have a saponaceous element; or possibly the ancients only beat their clothes with sticks, on the river banks, the same as the uncivilized races of the present time.

The manufacture of soap as a commodity began first at Marseilles and Geneva, but not according to a very scientific method. In the year 1791 Mr. le Blanc, a chemist, called the attention of the world to soda, which from that time the manufacturers have used in the making of soap. In the year 1823 another chemist, Mr. Cheuvreul, informed the world of an animal fat; and his dissertation so explained the matter, scientifically and commercially, that the manufacture of soap of good quality really began from that time, and still remains almost the same.

In almost every city are to be found statues of men who did something for the world; often even of men who did little good. Nowhere, however, is found a statue to honor the inventor of soap. It is true that some kinds of soap always existed, but they were only the work of nature, and not very useful, till Messrs. le Blanc and Cheuvreul gave to the world the advantage of their discoveries and made possible the manufacture of the good, useful soap with which we today are acquainted. Would not the world do honor to itself in honoring these two chemists? Really, every city should erect a statue to honor this discovery. The statue would remind us of the debt which we certainly owe to soap, and without doubt would be an excellent example to the children of our land and a help to the patient nurses, who daily have to explain to the children why it is advisable to wash the hands, to wash the face, and to care for the clothes that have been made clean by soap.

Instruisto, al malbona knabo: "Ho ve, mi timas ke mi neniam renkontos vin en ĉielo!"

Malbona knabo: "Nu, kial? Kion vi faris?"

J. H. FAZEL.

## Legendo de l' Minejo de "La Rue"

**J**E la fino de la 18a jarcento, la Roma Katolika Eklezio en Francujo serĉis memvoĵulojn inter la pastraro, por sendi ilin kiel misiistojn al sovaĝaj gentoj loĝantaj en norda Meksiklando. Estis elektitaj dek junaj pastroj, inter ili juna, pia pastro nomita La Rue, tre ambicia kaj kuraĝa, ne timanta danĝerojn aŭ malfacilaĵojn. Post lia alveno en la lando oni asignis al li malgrandan pastrejon, kelkajn tagojn malproksime de "Paso del Nordi." Lia domo estis en malgranda bieno, kaj nur malriĉuloj, preskaŭ nur indianoj, formis liajn parohanojn. Inter ili estis maljunulo, kiu pli frue batalis kiel soldato kontraŭ la sovaĝaj *apaĉoj* kaj *komanĉoj*. Lia patro estis franco, lia patrino indianino; kaj li iam estis vera ĉasisto de riĉeco kaj aventurulo, trapasinte grandan parton de l'montaroj kaj dezertoj de suda Meksiklando. La juna pastro amikiĝis kun la maljuna, duonrasa indiano, kaj lin prizorgis kaj flegis kun kvazaŭfila amo dum lia lasta malsano. Kun la koro plenigita je dankemo, la maljunulo rakontis al la pastro pri regiono de oro, kiun li iam vidis en la Nordo, trans la Rio Grande, en alta montaro, kelkajn tagvojaĝojn malproksime de la misiejo de Paso del Nordi.

"Por atingi tiun Golkonda' on," diris la indiano, "vi devas pasi trairejon je l'oriento; sub la plej alta pinto de l'monto kuŝas fonto, kaj sur unu el la intermontoj vi trovos ne nur riĉajn metalejojn, sed ankaŭ rokojn tiel riĉhavajn ke vi povas vidi la flavan metalon brilantan en la sunlumo. La metalejo kuŝas en malhela, profunda intermonto, kaj se vi ne serĉus tre zorgeme, estus tre eble preterlasi ĝin, ne eĉ suspektinte ĝian ekzistadon. Tiu monta valego estas nomita "San Aŭgustin," kaj la *tegnaj* aŭ *pueblas* indianoj nomas la fonton, "Fonto de l'Fantomoj," ĉar ili kredas ke la animoj de l'mortintoj ĝin gardas kontraŭ la hispanoj. En tiu tempo mi ne kuraĝis entrepreni prilabori la minon, sed gardis miajn sciĝojn sekrete, intencante reveni

en la estonteco. Mi kredas ke ĉiuj tieaj indianoj estis mortigitaj de l'apaĉoj, kaj la loko nun estas forlasita. Se ian ajn tagon vi tien irus, promesu uzi ĉi tiun sciigon por la ĉi tieaj malfeliĉuloj. Ĉiam estis mia revo reiri tien, serĉi la oron kaj ĝin dividi kun ili."

La juna pastro promesis plenumi la peton. Unu aŭ du jarojn post la morto de la soldato, okazis terura sekeco kaj malsatego; multaj indianoj de l'bieno pereis. La rakonto de l'muljuna militisto ĉiam sin altrudis al la imago de la pastro, kaj fine kunigante siajn parohanojn, li malkaŝis la sekreton kaj demandis, ĉu ili volas lin akompani al la "lando promesita." Ĉiuj gaje konsentis, promesante neniam malkaŝi la sekreton, kaj petegante ke li konduku ilin al tiu Golkonda'o. Ĉiuj forlasis siajn hejmojn, kaj sekvis la bonan pastron dum multe da tagoj, tra malgajaj dezertoj ĝis la malnova misiejo de l'Paso de l'Nord. Ili trairis la riveron, kiu estis preskaŭ seka, kaj post tri tagmarŝoj alvenis San Agustin'on, dek-kvar mejlojn oriente de l'nuna urbo San Cruces, kaj malsuprenirante monteton atingis lokon kiu similis la priskribon de l'fantoma fonto. Tie estis sufiĉego da akvo, freŝaj herboj kaj ĉiuspeca ĉasaĵo. Pastro La Rue komprenis, laŭ la priskribo de l'soldato, ke jen estas la loko serĉata; kaj aranĝante tendaron li forsendis la virojn ĉien por serĉi la oron. Post kelkaj tagoj unu viro revenis kun kolekto da oreroj, kiujn li kolektis en intermonto, meze de l'Organa montaro. Pastro La Rue baldaŭ konvinkigis ke tiu estas la loko priskribita de l'maljunulo. Pluaj serĉoj pruvis ke li estas prava, kaj li ordonis starigi tie daŭran tendaron.

En tiu tempo, Nova Meksiklando nur estis maldense enloĝita, kaj nur en valoj oni penis iom terkulturi. Oni decidis havi ĉiam gardantojn, por eviti ke nepartoprenantoj scivole esploru la minejon, kaj tiamaniere sin informu pri la deveno de l'oro. Komence, la kolonianoj prilaboris la orejojn kaj konstruis multe da metalmuelejoj apud la fonto, kien oni



alportis la kvarcon; tie oni ankaŭ fabrikgis multajn fandofornegojn el sunbakitaj brikoj. La enspezo de l'oreroj kaj mineralaj vejnoj estis grandega, kaj prospero eniris la malgrandan kolonion. La pastro elfosisis ĉambregon en la firma roko por sia loĝejo, kaj per ĝenerala konsento li estis nomata kasisto, kaj la tutan amasigitan oron li gardis en la subtera kasejo, disdonante al la indianoj tiom, kiom ili bezonis por aĉeti provizaĵojn de l'terkulturistoj en la valo. Tiamaniere la oro amasiĝis, kaj baldaŭ sumiĝis je milionoj; kaj necesis elfosi novan arkajon en loko nomita "Escondida" (kaŝita kav.) Ĉiuj loĝantoj de l'kolonio juris eternan sekretecon.

Pro la longa silento de Pastro La Rue, kiu ne estis sendinta raporton al la estro de l'eklezio en Meksiklando dum multe da jaroj, la estraro sendis viron nomitan Maksimiliano al la malnova bieno en ŝtato Cihuahua. Li trovis la lokon senhoma, kaj tion raportis al la estraro je sia reveno al Meksiklando. Ne kontentigite, tamen, oni lin resendis en ekspedicio por trovi pastron La Rue kaj liajn paroĥanojn. Post longa serĉado Maksimiliano sciigis pri la kolonio, sed la gardistoj malpermesis eniron al la senditoj, dirante ke ili ne povas eniri la kolonion. Pastro La Rue ordonis siajn paroĥanojn kovri ĉiujn laborojn de l'mino, kaj kaŝi ĉion, kio povus malkaŝi ĝian ekzistadon; ankaŭ kaŝi la kasejon kaj trezorejon kie

estis enkasigita la oro. Fine la invadantoj, forte armite, penetris la minejon, kaj, pretendantaj ke ili estas reprezentantoj de l'eklezio, postulis ke la pastro transdonu al ili la tutan oron kiun laŭdire li amasigis. Estis lia devo konsenti al tia peto, sed la pastro rifuzis, dirante ke li ne fordonos la oron, kaj eĉ ne elmontrus la minon, ĉar ĝin li konsideras la proprajo de siaj indianoj. Malgraŭ ĉiuj minacoj li kaj liaj kunuloj tute rifuzis konsenti la postulon. Unu nokton la invadantoj sekrete eniris senhoneste la minejon kaj la ŝtonĉambregon de l'pastro, kaj mortigis lin, sed ne trovis la deziritan oron. Per la plej kruelaj turmentoj ili provis eltiri la sekreton de l'kolonianoj, kiujn ili malliberigis kaj poste mortigis. Ĉiuj suferis kuraĝe la turmentojn, sed la sekreto mortis kune kun ili.

Kelkaj kolonianoj sin savis, forkurante, kaj disiris ĉien. Eĉ nuntage iliaj posteuloj gardas religie la sekreton de l'loko de ĉi tiu Golkondo. La altegaj, silentaj pintoj de la montaro Organo gardas la malnovan minon de l'pastro La Rue kaj liaj paroĥanoj. La sola persono kiu konas ĝian lokon estas maljuna ermito, kies avo laboris en la mino je la tempo de Pastro La Rue, kaj kun li la sekreto enteriĝos por ĉiam.

*tradukis*

ILLIMATEUKTLI,

*Toluca, Meksiklando.*

## La Fantoma Muzikisto

*(La sekvanta rakonto eble estas interesa pro tio, ke ĝi venis al la verkinto en sonĝo. Ĉi sube ĝi aperas, preskaŭ laŭvorte laŭ la sonĝo; sed la plej stranga fakto estas, ke ĝi venis el ia nekonata deveno. La verkinto neniam legis, neniam aŭdis, kaj neniam elpensis similan rakonton, kaj kial la sonĝo venis tiel mistere, tiel perfekte, estas problemo por la psikologiisto.)*

**A**N antikva, tamen luksa domo en malgranda "Verda Valo," en la Rokaj Montoj de Usono, ĉio estis gaja. Estis la naskiĝa tago de la mastro, kaj kiam oni festas naskiĝan tagon, tiam oni ja ne povas esti malfeliĉa. En la kandelingo kaj sur la fenestroj hele brilis kandeloj, kaj en la kameno gaje flirtis la fajro. La granda tablo estis ŝarĝita per manĝaĵoj, kaj ĉirkaŭ ĝi sidis la familio

kaj intimaj amikoj. Oni manĝis kaj trinkis kaj babilis; ĉio estis gaja.

Subite aŭdiĝis plej malĝoja kaj mistera muziko el unu el la supraĵ ĉambroj. La infanoj aliĝis, la aliaj surprizite aŭskultis. Ĉiuj ja sidis ĉirkaŭ la tablo, kaj kiu la ludanto estas oni tute ne povis diveni. Misteraj kiel funebra himno venis la notoj; mallautaj kiel la sopiro de aŭtuna vento.

"Mi ne povas resti tie ĉi," diris la mas-

tro; "mi devas supreniri kaj trovi la klarigon de ĉi tiu enigmo."

Dirante tiujn ĉi vortojn li prenis kandelon kaj akompanate de unu el la gastoj, kviete supreniris. La muziko venis el lia studĉambro, kaj malrapide malferminte la pordon li enrigardis. Tie sidis fantoma viro, pala, kaj preskaŭ travidebla. Neĝblanka estis lia hararo kaj la vizaĝo havis plej doloran elrigardon. En la manoj li tenis la blov-instrumenton de la mastro, kaj ĝin mallaŭte ludis.

"Kie vi estas, fremdulo?" demandis sentime la mastro. "Kaj kion vi deziras tie ĉi?"

"Sidiĝu!" diris la fantomo per malĝoja voĉo. "Mi estas muzikisto, kiu antaŭ kvindek jaroj loĝis en tiu ĉi domo. Ĉiutage mi ludis en la luksaj teatroj kaj dancsalonegoj, kaj mi akiris multe da mono. Sed mi ne inde uzis ĝin. Ju pli multe mi akiris des pli avida mi fariĝis. Malgraŭ mia riĉeco miaj gepatroj loĝis en malgranda domaĉo. Ili estis tre malriĉaj kaj ofte ne havis sufiĉe da mono por aĉeti panon. Sed mi ne donis al ili ec unu moneron; mi estis vera avarulo. Fine mi mortis kaj miaj kamaradoj interigis min en la urba tombejo. Sed sur mia tombo ne kreskas herbo aŭ floroj; mi eĉ ne havas tombŝtonon. Mi ne povas trankvile dormi en mia tomba lito, kaj unu nokton en ĉiu jaro mi devas iradi sur la tero. Nur kiam iu prenos mian

monon kaj inde uzos ĝin, tiam mi povos trankvile restadi en la tombo. Mi ne meritas helpon, sed mi petegas vin, ho amiko, ke vi prenu mian monon kaj elspezu ĝin laŭ la volo de Dio; tiam mi dormos trankvile ĝis la lasta granda tago. En la kelo sub la forno vi trovos la oron. Plenumu mian petegon, kaj Dio vin benu."

Kiel vaporo maldensiĝas en la aero, tiel la fantomo malaperis. La du homoj preskaŭ ne povis kredi siajn proprajn okulojn. Tamen, post silenta reciproka rigardo ili decidis serĉi la kelon por la oro. Ili ne longe devis labori. Eltirinte la brikojn antaŭ la forno, ili trovis skatolon en kiu troviĝis multe da oro. Laŭ la petego de la mortinta muzikisto ili inde elspezis la monon, donante multon al la malriĉuloj kaj multon al eklezioj kaj lernejoj.

Tamen, la plej mirinda fakto en tiu ĉi historio estas la jena: En la printempo, kiam oni faris la unuan ĉiujaran viziton al la urba tombejo, oni rimarkis mirindan ŝanĝon ĉe la tombo sur kiu herbo kaj floroj neniam antaŭe kreskis, kaj sur kiu eĉ ne tombŝtono troviĝis. Nun la tombo estis verda per herbo, kaj belegaj floroj kreskis sur ĝi, kaj ĉe la tombo staris neĝblanka ŝtono, sur kiu oni legis la vortojn:

"Dio amas bonkoran donanton."

LEHMAN WENDELL.

## Ŝerca Tosto

OKAZE DE LA N. E. E. A. KUNVENO EN MANCHESTER.

**I**AM viro, kiu kredis ke la fino de la mondo estas proksima, ekdormis en kampo post tagmanĝo, kaj liaj kunuloj amasigis pajlon ĉirkaŭ li, ne tro proksime, kaj ekbruligis ĝin. Baldaŭ li vekigis, ĉirkaŭrigardis kaj ekkriis, "En infero, same kiel mi atendis!" Nun mi deziras silenti kaj aŭskulti,—sed vi postulas paroladon, "same kiel mi atendis."

Estas plezuro aldoni vorton bonvenan al vi en ĉi tiu urbo. Gi estas viva urbo, kiel ankaŭ bela. Gi estas sana urbo, preskaŭ tiel sana kiel la fama sanejo kie

vizitantino demandis, "Ĉu homoj tre ofte mortas ĉi tie?" "Ne, sinjorino," diris loĝanto, "ili nur unufoje mortas." Si estis iom simila al la viro kiu legis en Nov-Jorka ĵurnalo ke en tiu urbo naskiĝis infaneto ĉiun minuton: li rapidis al la urbo, trovis la redaktoron, kaj diris de li tre multe deziras vidi tiun infaneton!

Mi ĝojas ke estas doktoro en la aro, ĉar la anoj el Bostono, kutimite al dieto de porkviando kaj faboj, eble fariĝos malsanaj pro tro diversa menuo. Mi ja esperas ke operacio ne estos necesa. "Doktoro," diris malsanulo, "ĉu operacio

estas tute necesa?" "Ne," respondis la doktoro, "sed ĝi estas kutima."

Sed mi supozas ke vi atendas paroladeton en kiu mi laŭdos Esperanton. Estos granda plezuro fari tion. Mi ĝojas ke mi estas studinta la lingvon. Mi multe ŝuldas al la gramatiko de Kellerman, ĉar mi tie lernis ke ankaŭ Sokrato estis senhara: ankoraŭ estas espero por mi.

Esperanto estas multe farinta por mi: mi eniris nur amerikano, mi elvenis ano de la mondo. Mi eniris nur lernejestro; mi elvenis farmulo. Mi elvenis kun edzino kaj kvar geinfanoj,—sed mi antaŭe havis ilin, tial ili ne estas kalkulitaj!

Sed tio rememorigas al mi; ĉu vi, sinjorinoj, scias kial edzoj vivas pli longe ol fraŭloj? Ne? Nu, tio ne estas vera. Nur ŝajnas pli longe.

Tamen edzino kiu vivas pli longe ol ŝia edzo estas kelkoje pli prospera. Iam oni demandis al vidvino ĉu ŝi kredas ke la edzeco estas malsukceso. "Ho ne," ŝi respondis, "ĉar mi edziniĝis kun tri edzoj, kiuj laŭvice mortis, kaj ĉiu estis

asekurita je dek mil dolaroj."

Eble ŝi estis pli prospera ol la vidvino kiu eniris vagonaron en Bostono, portante pakajon en la brakoj. Si sidiĝis flanke de fraŭlino, ne tre juna, kaj ili baldaŭ komencis paroli pri la funebra vesto de la vidvino. "Jes," ŝi diris, "mia unua edzo, kara Johano, estis ŝipestro, ĝis kiam la ŝipo brulis sur la maro, kaj li pereis kun la ŝipo. Mia dua edzo, estimata Henriko, estis maŝinisto, sed la vaporigilo eksplodis, la fabrikejo forbrulis, kaj li perdis la vivon en la flamoj. Mia tria edzo, kara Marko, jus mortis, kaj mi havas en ĉi tiu urno lian cindron, kiun mi portas hejmen por enterigi." Estis silento dum kelkaj minutoj, kiam subite la fraŭlino laŭte ekploreĝis. Kiam la vidvino esprimis sian surprizon je la granda kompatado de nekonatino, la fraŭlino respondis, "Ho, ne estas pro vi sed pro mi mem ke mi ploras; pensu, ke ĉiujn ĉi tiujn jarojn mi estas dezirinta edzon, kaj Dio estas rifuzinta unu al mi dum vi havis edzojn por bruligi!"

WM. H. HUSE.

## La Familio

Kompatinda riĉul',—orfo post la naskiĝo,  
Li ĉagrenojn suferis pro vana tediĝo—  
Fine lin trosatigis vivado plezura  
Kaj feliĉo foriris—Ho sorto terura!  
Preferinda por li estus eble la morto,  
Sen amikoj, sen hejmo, sen revoj, sen forto,—

Cio mankis al li! Cio estis motivo  
Ke prave li volus forkuri el vivo;  
Se li mortos, ho ve! Eble ion pli belan  
Li ekĝuos lasinte la mondon malhelan.

Kia nokto malluma sur tero la vasta!  
Kaj ĝi estos por li, kiu mortos, la lasta,  
Kiun vidas li nun, tre malgaje en mondo.

Cu vi aŭdas la bruon fortegan de ondo?  
Certe vin ĝi alvokas—Ho, iru sen timo  
Kaj la vivon forlasu. Ne estos ja krimo;  
Se vi aŭdi konsilojn prudentajn kuraĝos,  
Tie baldaŭ vi fine mortinte surnaĝos!

Li foriris. En strato timeme irante,  
Pri terura mortiĝo ankoraŭ pensante,  
Li ekhaltis subite—sed kion li faras?  
Kial apud dometo malriĉa li staras?  
Tra fenestro la scenon internan li vidas:

Laborante je tablo, patrino jen sidas;  
Apud ŝi, kiu kudras, du ĉarmaj filetoj  
Gaje vidas bildaron sur kiu kapetoj  
De l' petolaj infanoj ridemaj kliniĝas.  
Tre proksima ĉambreto silenta vidiĝas  
Kie patro laboras amema, bonkora;  
Kaj l' avino maljuna, kun sento fervora,  
Rigardante la nepojn, trankvile pre-  
gadas.

Kia paco dolĉega ĉi tie regadas!  
Ho, serena vivad' en la hejm' familia—  
Rifugejo ĉiela en mond' komedia!  
Nur karesoj kaj amo kreadas la ĝojon.  
Rigardinte, la knabo—ekŝanĝis la vojon.

J. B. MELLO SOUZA,  
Rio de Janeiro, Brazilo.

# La Violoj

(MONOLOGO POR VIRINO.)

(*Eniras florvendistino, juna, bone sed simple vestita. Si portas en sia mano korbon enhavantan diantojn, fasketojn de diverskoloraj rozoj, konvalojn kaj grandan bukedon da violoj. Enirante ŝi diras:*)

Ha! tie sub la arbo estas sinjoro; eble li ion aĉetos.

(*Si venas antaŭen, elektas ruĝan dian-ton el la korbo, kviete alproksimiĝas, kaj ridetante per ĉarma sed modesta maniero, elmontras la floron. Post iom da silento ŝi ekparolas:*)

Cu vi ne deziras belan dian-ton, Sinjoro, por via butontruo? Nuntempe ĝi estas la floro la plej laŭmoda. Bela kavaliro, kia vi, ne devus promeni en la parko sen dianto. Rigardu tiun ĉi ruĝan. Cu ĝi ne estas bela? Ĝi farus grandan efekton sur via nigra vesto. Ne? Do prenu la blankan, tiel bonodoran. (*Si eltiras blankan dian-ton.*) Aĉetu unu, Sinjoro; vi ne trovos alian tiel parfumplena en la tuta urbo. \* \* \* Ha! mi divenas kial vi ne ne volas aĉeti ĝin. La belaj fraŭlinoj rigardas vian vizaĝon, kaj tio plaĉas al vi. Vi timas ke ili tro rigardos la floron. \* \* \* Jes, jes, la dianto ne taŭgas. Mi estis malprava, ĉar vi nenion deziras por vi mem. Tamen, certe, vi ion aĉetos por via amikino, via amatino. (*Si sin movas flanken dum momento, esplorante la korbon kaj elektas fasketon da rozoj.*) Jen, Sinjoro Kavaliro, la rozoj. La rozo estas la reĝino el la floraro, kaj kiam vi renkontos vian amantinon kaj prezentos fasketon da rozoj, ŝi estos ĝojravata. Rigardu tiujn ĉi duonblankajn, kun apenaŭ nuanco de rozruĝa koloro. Cu ili ne similas la manojn de la fraŭlino? Au tiujn ĉi, ruĝajn (*Si elprenas alian fasketon*) kiel ŝiaj lipoj aŭ ŝiaj ruĝiĝetoj. Au tiun ĉi malpalan (*Si elektas alian*). Se ŝi metus ĝin en sian hararon kiam ŝi iros hodiaŭ vespere al la operdomo, ŝi ŝajnus pli bela ol iam. Ho sinjoro, vi devus aĉeti miajn rozojn. Vi malĝojos poste se vi foriros nenion aĉetinte. Mi petas ke vi akiru almenaŭ unu rozeton.

(*Tiam ŝi silentas, rigardante, poste reiras flanken dirante mallaŭte:*) Ha, li nenion aĉetos. Neniu deziras miajn florojn hodiaŭ, kaj ili kostis tiel kare. Kion diros mia mizera patrino, se mi revenos hejmen sen mono? Si estas pli malsana, kaj bezonas pli bonan nutraron, kaj ŝi diris, Karulino, hodiaŭ elspezu vian tutan monon, kaj aĉetu la plej belajn florojn en la vendejo, por ke vi povu revendi ilin pli bone. \* \* \* Mi tuj komprenis ke tiu sinjoro nenion aĉetos por si mem, kaj nun mi scias ke li nenium amindumas. Sed kuraĝon! Kredeble li havas infanojn. Mi provos ankoraŭ unufoje. (*Si revenas, tirante konvalojn el la korbo.*) Pardonu min, Sinjoro. Mi forgesis montri la konvalojn. Eble ili plaĉos al vi, ĉar ili estas la floroj por la infanoj, tiel malgrandaj, tiel puraj kaj modestaj; ili taŭgas al la senmakulaj infanoj. Rigardu la blankajn sonoriletojn sur la trunketoj. Oni diras ke la reĝino de la Feinoj sonorigas ilin en la arbaro noktmeze, kiam ni ĉiuj dormas, kaj la feinaro gaje dancas ĉirkaŭe kantante. (*Si komencas danceti kaj kanteti:*)

Belaj floretoj, Sonoriletoj,  
Nun ni dancadu;  
Blankaj konvaloj, Viaj pokaloj  
Dolĉe sonadu.

Eĉ mia avino foje perdiĝis en malluma nokto, kaj ŝi aŭdis tra la kreskajojn strangan melodion; kaj tiam la luno aperis el la nigraj nuboj kaj ŝi ekvidis la feinojn rondkantajn, kaj ili kantis:

Via parfumo en la lunlumo  
Nin ĝojigadu;  
Dum najtingaloj kantas, konvaloj  
Sonu, sonadu!

Aŭskultu, Sinjoro! (*Si tuŝas la floretojn.*) Do, re, mi, fa, sol, la, si, do. \* \* \* Do, si, la, sol, fa, mi, re, do. Cu vi aŭdas la muzikon? Portu hejmen la sonoriletojn por viaj infanoj. Tiu ĉi pli granda estas

la plej maljuna el via familo, kaj tiu ĉi supre estas la idino, apenaŭ naskiĝinta. Kiam vi montros la florojn al viaj infanoj, kaj rakontos miajn vortojn pri la feinoj, viaj geinfanoj estos ĝojplenaj, kaj vi ĉiuj dancos kune tiel gaje kiel la feinoj. \* \* \*

Ne, ne, (*parolante pli malrapide kaj malĝoje, dum larmeto ekgutas sur sian vangon.*) Ne plaĉas al vi miaj konvaloj, kaj vi ŝatas nek la diantojn nek la rozojn. Mi ne havas aliajn florojn,—almenaŭ nur bukedon da violoj. Sed ili estas malĝojaj floroj, ĉiam klinante siajn kapojn kaj sin kaŝante sub la folioj. Mi ĉiam pensas ke ili havas en siaj koroj kelkan ĉagrenon aŭ doloron. Sajnas ke ili estas malfeliĉaj kaj ploras. Kaj niaj kamparanoj kutimas meti ilin sur la tombojn. Ili diras ke la mortintoj pli feliĉiĝos. Nur hieraŭ mi pasis apud la mortintejo kaj haltis ĉe la pordego, kaj mi ekvidis proksime tombon nove fositan, tute kovritan per violoj. Mi flaris la dolĉan parfumon. Kaj tie surgenue estis sinjoro, vestita tute nigre kiel vi, kiu preĝis kaj ploris. Kaj la maljuna pordgardisto, kiun mi konas tre bone,—li estis amiko de mia patro kiu mortis la lastan jaron. Dio benu lian animon!—diris al mi ke tiu sinjoro perdis sian edzinon antaŭ malmulte da tagoj, kaj ŝi estis tiel bona kiel bela, vera sanktulino, kiu ĉiam helpis la malsanulojn kaj ĉiutage vizitis la mizerulojn. Kaj la edzo adoris ŝin, kaj nun lia koro estas rompita, kaj li parolas kun neniu, sed restas sola la tutan tagon en kvieta loko sub la arboj,

pensante pri sia perditino. Kia malfeliĉa sorto! Dio helpu lin! Mi mem preskaŭ ploris, kaj foriris tiel malĝoja, kaj mi ne povis forgesi lin, kaj dormis tre malmulte, pensante pri li; kaj se vi, sinjoro, \* \* \* (*Si haltas, trarigardante, kaj silentas \* \* \* tiam ŝi ekkrias:*)

Ho Sinjoro, kio okazas? ĉu vi estas malsana? Ho, ĉu mi alvoku iun? Ho, Dio, mia, li eksvenas, li svenas, kion mi povas fari? \* \* \* (*Tiam subite kiel fulmofajro ŝin frapas la konvinkiĝo ke li mem estas la malfeliĉa vidvo kiun ŝi vidis hieraŭ, nigre vestitan kaj plorantan en la mortintejo, kaj ŝi ĵetas sin teren surgenue:*)

Ho, Sinjoro, pardonu min, pardonu min! Mi babiladis, nenion sciante pri via doloro, sed nun mi rekonas vin. Ho, ĝentila sinjoro, mi ne volis malfermi la vundojn en via koro. Kia malsaĝulino mi estas! Mi ne povas min senkulpigi, sed pardonu min,—ne, ne, Sinjoro, ne donu monon al mi; mi nenion bezonas, nenion. Mi tuj foriros, kaj vi neniam plu revidos min, sed mi lasos miajn senvalorajn florojn, jes, ĉiujn, ĉiujn. Ankaŭ ili baldaŭ velkos kaj mortos, . . . sed eble ŝi lernos, ke mizera virino kompatas vin. Prenu miajn florojn, Sinjoro, mi petas. . . . (*Si rapide envolvus ĉion en paperfolio, kaj silente demetas ĝin sur la teron.*)

Portu ilin . . . al . . . ŝia tombo. (*Tiam ŝi foriras ĝemetante kaj malaperas.*)

CLARENCE BICKNELL,  
*Bordighera, Italujo.*

KION PENSAS LA RUMANA REĜINO.

(CARMEN SYLVA.)

La vivo estas arto, en kiu plej ofte homo restas nur diletanto; por fariĝi majstro, oni devas elflui la sangon el sia propra koro.

La edukado estas lernejo de la koro.

La muŝoj similas al la ĵurnalistoj: nenio estas por ili sankta.

Dio pardonas; la naturo neniam.

La homo similas la violonon; kiam ŝiriĝas ankaŭ la lasta kordo, restas peco da ligno.

La amo konas nenion alian, krom la estanteco.

La batalo por la ĉiutaga nutraĵo sekigas la larmojn.

Kiam vin forlasos ankaŭ la sufero, tiam ĉio estas finita.

La genio similas la sunon,—pruntante al ni la propran brilon.

Tio, kio diferencigas la homon de l' bestoj estas la dubo.

*Tradukis,*

Iv. H. KRESTANOV,  
*Pirdop, Bulgarujo.*

# Terposedado Venigas Barbarecon

DE HENRY GEORGE.

(Elĉerpajo el la libro *Progress and Poverty.*)

**N**IATEMPE, kiel en la tempoj pasintaj, ekzistas iuj kaŭzoj, kiuj, produktante malegalecon, detruas liberecon. Sur la horizonto komencas malleviĝi la nuboj. Libereco denove nin alvokas. Ni devas ankoraŭ plu ŝin sekvi, ni devas plene ŝin fidi, ni devas plene ŝin akcepti, aŭ ŝi ne restos. Ne estas sufiĉe ke homoj havas la rajton voĉdoni; ne sufiĉas ke ili staras teorie egalaj antaŭ la leĝo. Ili devas havi egalajn rajtojn al la bonfarado de la naturo. Aŭ tio okazos, aŭ libereco forprenos sian lumon; aŭ tio, aŭ la mallumo venos sur nin, kaj la povoj disvolvigataj de la progreso mem fariĝos la rimedoj efektivigontaj detruon. Ĉi tiu estas universala leĝo. Ĉi tiu estas la leciono de la centjaroj. Se ĝia fundamento ne estus starigita en justeco, la socia konstruaĵo ne povus stari.

Nia unua aĝustigo estas neado de justeco. Permesante al unu homo posedi la teron,—sur kiu, kaj el kiu, aliaj homoj devas obteni la vivrimedojn,—ni faras el ili ties sklavojn, laŭ grado kiu pligrandiĝas dum materiala progreso antaŭeniras. Ĉi tiu estas la delikata alhemio kiu, laŭ maniero kiun ili tute ne suspektas, deprenas de la malaltaj klasoj en ĉiu civilizita lando la fruktojn de ilia malfacila laboro; kiu ja efektivas politikan despotismon el tio, kio estas politika libereco, kaj baldaŭ anstataŭigos demokratajn instituciojn per anarĥismo. Estas tio, kio faras malbenojn el la benoj de materiala prospero. Estas tio, kio amasigas homojn en malbonodoraj keloj kaj malpuraj loĝejoj; kiu plenigas la malliberejojn kaj malcastulejojn, pikas homojn per mizerego, kaj bruligas ilin per avido; kio forrabas de virinoj la ĉarmon kaj belecon de perfekta virineco; kio deprenas de malgrandaj infanoj la ĝojon kaj senkulpecon de la vivmateno.

Civilizacio tiel bazita ne povas daŭri.

La eternaj leĝoj de la universo ĝin malpermesas. La ruinoj de mortintaj imperioj atestas, kaj la atestanto kiu troviĝas en ĉiu animo respondas, ke ĝi ne povas esti. Io pli granda ol bonvolo, pli impona ol bonfarado, efektive justeco mem, postulas de ni ke ni forigu ĉi tiun maljustaĵon. Justeco, kiu ne konsentos esti neigata, kiu ne konsentos esti postmetata,—justeco, kiu portas la glavon kune kun la pesilo. Ĉu estas eble ke ni povas eviti la baton per liturgioj kaj preĝoj? Ĉu ni povas forflugi de la dekretoj de neŝanĝeblaj leĝoj per la konstruado de preĝejoj, dum malsataj infanoj ĝemas kaj lacaj patrinoj ploras?

Kvankam ĝi ŝajnis preĝon, tio estas vera blasfemo, kio aljuĝas al la neesplorableblaj dekretoj de Dio la suferadon kaj brutecon okazantan pro malriĉeco, kio sin turnas kun falditaj brakoj, kaj Lin kulpigas pro la malsato kaj krimo de niaj grandaj urboj. Ni malnobligas la Eternulon, ni kalumnias la Justecon. Kompatema homo estus pli bone ordiginta la mondon; justa homo disbatus per sia piedo la ulceran formikejon. Ne estas kulpa la Ciopova, sed ni mem estas kulpaj pro la mizerego kaj malvirto kiuj ulceriĝas en nia civilizacio. La Kreinto surpluvegis sur nin siajn donacojn, pli ol sufiĉe por ĉiuj. Sed, same kiel porkoj sin reciproke dispuŝantaj por nutraĵo, ni piedpremas ilin en la koton,—piedpremas ilin en la koton dum ni disŝiras kaj pugnobatas ĉiu la aliajn!

Eĉ en la centroj de nia hodiaŭa civilizacio troviĝas sufiĉe da mizerego kaj suferado por kortuŝi ĉiun homon, kiu ne fermas la okulojn kaj ŝtaligas la nervojn. Ĉu ni kuraĝas nin turni al la Kreinto kaj postuli de Li ke Li ĝin forigu per ankoraŭ pli grandaj donacoj? Ni supozu ke la preĝo estus aŭdita, kaj la sama potenco, kiu kreis la universon, briligus

en la suno pli grandan povon, ke nova potenco plenigus la aeron; ke la tero fariĝus tiel fruktodona ke kie nun kreskas unu herbero aperus du, kaj kie nun semo plimultobliĝas kvindekoble, tiam plimultobliĝos centoble! Cu tiam malriceco plimalgrandiĝus, aŭ mizerego estus forigata? Kompreneble ne! Kia ajn profito okazus, ĝi estus nur kelktempa. Sole la tero povus uzi la novajn potencojn kiuj plenigus la materialan universon; kaj ĉar tero estas privata posedajo, la klasoj kiuj nun akaparas la bonfarecon de la Kreinto tute akaparus la novan bonfaradon. Sole la terposedantoj profitus. Luprezoj pligrandiĝus, sed salajroj ankoraŭ restus je la punkto de malsateco.

Ci tio ne estas sole dedukto de politika ekonomio, sed fakto el sperto. Ni ĝin scias, ĉar ni estas ĝin vidintaj. En nia propra vivepoko, sub niaj propraj okuloj, tiu povo,—kiu estas super ĉio, kiun la tuta universo montras, kiu kreas ĉion kaj sen kiu efektiviĝas nenio,—jam efektive pligrandigis la bonfaron de homoj, tiel vere kvazaŭ la fruktodoneco de la naturo mem plifortigis. En ies cerbon venis la penso, ke vaporo povas esti jungata por servi al homaro. En la orelojn de alia estis subparolata la sekreto, kiu devigas al la fulmo ke ĝi portu ĉirkaŭ la terglobo senditajon. Cie estas malkaŝitaj la leĝoj de materio; en ĉiuj fakoj de industrio jam levigigas brakoj el fero kaj fingroj el ŝtalo, kiuj kaŭzas produktadon, same kvazaŭ estus okazinta plifortigo en la potencoj de naturo. Kaj, kia rezulto okazas? Simple ke la terposedanto ricevas la tutan profiton. La mirindaj eltrovaĵoj kaj elpensajoj de nia centjaro nek pligrandigis la salajrojn, nek plimalgrandigis la laboradon. La sola rezulto estas ke riĉuloj fariĝas pli riĉaj, kaj malriĉuloj fariĝas pli malfortaj.

Cu la donacoj de la Kreinto povas esti tiel malrajte, senpune proprigitaj? Cu estas juste ke oni forrabu de laboranto lian justan gajnon, dum aviduloj sin drolotas en lukso? Ke la plejmulto devas suferi pro malsato dum malmultaj tro-satiĝas? Turnu vin al la historio; kaj sur ĉiu paĝo estas skribita ke tia maljustaĵo neniam daŭras senpunita; ke la nemeso,

kiu ĉiam sekvas maljustecon, neniam haltas, nek dormas. Ĉirkaŭrigardu hodiaŭ: Cu estas eble ke tia stato povas daŭri? Cu ni eĉ povas diri, "Post ni la superakvego?" Ne! La apogiloj de la ŝtato eĉ nun ŝanceliĝas, kaj la fundamentoj mem de la socia konstruaĵo komencas ŝanceliĝi pro la internaj fajroj, kiuj sube brilas. Alproksimiĝas, se ne efektive komenciĝas, la baraktado kiu revivigos aŭ ruinigos. La dekreto estas jam dissendita. Kune kun vaporo kaj elektro kaj la novaj potencoj naskitaj de progreso, jam eniras la mondon potencoj kiuj nin altigos, aŭ subpremigis nin; same kiel nacio post nacio, kaj civilizacio post civilizacio, estis subpremegita antaŭe. Nur la iluzio kiu antaŭeniras detruon nomus la popolan malkontentecon, kiu nun kaptas la tutan mondon, simple kelktempa rezulto de negravaj kaŭzoj. Inter demokrataj ideoj kaj aristokrataj alĝustigoj de societo ekzistas neakordigebla konflikto. Ci tie, en Usono, kiel en Eŭropo, ni povas ĝin vidi leviganta. Ni tute ne povas daŭrigi la nuntempan kutimon permesi al viroj ke ili voĉdonu, sed devigi al ili ke ili almozpetu. Ni ne povas daŭrigi la edukadon de knaboj kaj knabinoj en niaj publikaj lernejoj, poste malpermesante al ili ke ili gajnu honestan vivrimedon. Ni ne povas ankoraŭ paroli pri la nedepreneblaj rajtoj de la homoj, poste rifuzante ilian nedepreneblan rajton al la bonfareco de la Kreinto. Ĉe nun, en malnovaj boteloj, la nova vino ekfermentas, kaj elementaj potencoj kuniĝas por la batalo.

Sed se ni nin turnus al la Justeco kaj ŝin obeus, dum ankoraŭ estas tempo, se ni fidus al libereco kaj ŝin sekvus, la danĝeroj kiuj nun minacas malaperus; la potencoj, kiuj nun timigas, fariĝus rimedoj por nin altigi. Pensu pri la potencoj nun malŝparitaj, pri la senfinaj kampoj de scienco ankoraŭ esplorotaj, pri la eblecoj kiujn la mirindaj nunaj eltrovaĵoj nur iomete aludas. Se mizerego estus detruita, se avideco ŝanĝiĝus en noblajn pasiojn, se la frateco, kiu naskiĝas el egaleco, efektiviĝus, kaj anstataŭus tiun ĵaluzon kaj timon, kiuj nun metas homojn unujn kontraŭ aliaj, se la spirito estus malligita per kondiĉoj

donantaj al la malaltrunguloj komforton kaj ludtempon,—kiu povas mezuri la altecon al kiu nia civilizacio povus leviĝi? Vortoj tute ne sufiĉas al la penso! Tio estus la ora epoko, pri kiu la poetoj kantis, kaj altaj profetoj predikis al ni en metaforo. Ĝi estas la glora aperaĵo kiu ĉiam estas obsedinta la homojn.

Tion vidis li, kies okuloj ŝajnmorte fermiĝis ĉe Patmos. Ĝi estus la plenumo de kristaneco,—la urbo de Dio sur la tero, kun muroj el jaspo, kaj pordegoj el perlo. Ĝi estus la regno de la Princo de Paco.

*El la angla tradukis,*  
FRANK P. ZENT.

## Georgo Vaŝington Kaj La Ŝtelisto

**V**IDU mian Dordon Vas'n'ton, Onklo Filipino. Cu li ne estas bela kato?"

Mia malgranda nevo venis kurante al mi, kiam mi eniris en la domon, en siaj brakoj tenante nekulture aspektantan beston, videble el la rango de strataj katoj. Estis pluva posttagmezo, kaj la felo de la besto estis malseka kaj malorda; kaj facile estis vidi ke ĝi eniris en la domon nur antaŭ nelonge.

"Ho, Sinjoro Filipino," diris la servistino al mi, "ĉu vi ne povas igi lin ellasi la bestaĉon? Ho, kion diros lia patrino kiam ŝi vidos lian veston tute malseka kaj ĉifita? Li ne volas ke mi forprenu la malbelan beston."

"Li ne estas malbela, mia Dordo Vas'n'ton, tute ne," asertis Karlo indigne. "Mi amas mian Dordon Vas'n'ton, kaj vi estas tre malbona virino, tial ke vi tiel parolas pri li."

"Jen, Karlo," mi diris persvade, "la kato finis sian viziton, kaj nun li volas foriri. Ne estas ĝentile teni vizitanton kontraŭ lia volo."

"Ne, ne, ne!" kaj Karlo piedfrapis la plankon; "li ne estas vizitanto; li estas mia kato, kaj li tute ne volas foriri, kaj mi amas lin."

Mi senhelpe rigardis la servistinon.

"Mario, kie estas la sinjorino?"

"Ŝi eliris post la meztagmanĝo, kaj ankoraŭ ne revenis."

"Nu, ni atendu ĝis ŝia reveno. Ni lasos al ŝi decidi pri la afero."

La mizera besto ŝajnis tute kontenta esti kunpremata en la brakoj de la malgranda kvarjarulo.

"Karlo," mi demandis, "kial vi nomas ĝin Georgo Vaŝington?"

"Tial ke Dordo Vas'n'ton ne povis mensogi," diris Karlo konvinkige.

"Tre bona rezonado! Sed," mi daŭri-

gis post kelktempa observado de la besto, "ĉu ne estus tiel bone nomi ĝin Marta Vaŝington? Eble ankaŭ ŝi ne povis mensogi."

"Li tute ne estas Marta Vas'n'ton; li estas mia Dordo Vas'n'ton, tial ke Dordo Vas'n'ton ne povis mensogi," li asertis obstine.

Kiam mia fratino revenis ŝi provis persvadi al Karlo foririgi la malbelan beston, sed tiel larne kontraŭstaris li la perdon de sia kara Georgo Vaŝington ke ŝi fine diris:

"Nu, ni vidos kion diros la patro kiam li venos domon."

Mia bofrato ne ŝatis la aspekton de la besto, kaj proponis al Karlo pli belan katon anstataŭ la malbela fremdulo. Sed Karlo indignigita kriis:

"Ne ekzistas pli bela kato; mi volas havi nur mian Dordon Vas'n'ton."

La patro ridis, "Nu, la obstinuleto tenu la beston, se li deziras. Eble li enuos je ĝi baldaŭ."

Sed ne tiel okazis. La knabo kaj la kato estis nedisiĝeblaj. La besto pacience ĉiam suferis la iom tro entuziasmajn karesojn de sia malgranda mastro, dum kontraŭ ĉiuj aliaj el ni ĝi sin tenis malamike, gratante kaj eĉ mordante nin kiam ni penis karesi ĝin. Estis mirinde kiel tia besto, tiel malafabla al aliaj homoj, ŝajnis adori la knabeton.

Unu tagon mia fratino sidis sur la verando brodante, kaj Karlo ludis en la korto. Subite granda hundo enkuris en la korton, kaj sovaĝe saltis sur la knabon, kies ŝultron ĝi kaptis per la dentoj. Mia fratino saltis kriante al la filo, sed antaŭ ol la hundo povis pli multe lin vundi la kato kiel fulmobrilo saltis sur ĝian dorson kaj komencis ŝiri ĝian nazon kaj vizaĝon per la akraj ungegoj, tiel efektive ke la besto tuj lasis Karlon, kaj laŭte blekante forkuris el la korto kaj laŭ



la strato, dum la kato daŭrigis ioman distancon rajdi kaj grati. Tiam ĝi desaltis kaj revenis al la verando, kie ĝi sidigis kaj komencis purigi siajn vizaĝon kaj piedojn.

Tiu ĉi ago gajnis por la kato la amon de la patrino, kiu proklamis ĝin la savinto de sia knabeto; kaj ĝi posedis la admiron de ĉiuj ni, ankaŭ mian respekton, ĉar pli ol antaŭe ĝi ne suferis niajn karesojn.

Fine Georgeo Vaŝington malaperis kelke da tempo, kaj dume Karlo estis nekonsolebla. Sed unu vesperon la kato revenis portante per la buŝo katidon kiun ĝi demetis ĉe la piedoj de la ĝojanta mastreto. Tiam foririnte, ĝi enportis ankoraŭ tri, unu post la alia.

Multe plaĉis al Karlo la malgrandaj kreitoj, sed ŝajne liaj entuziasmaj karesado kaj alpremigado multe maltrankviligis Georgon Vaŝington; tial dum Karlo estis en la kuirejo por akiri kukojn de Mario, ĝi forportis la idojn; kaj kiam Karlo revenis en la ĉambro li ploris pri ilia malapero. Mario enlitigis lin, kaj sukcesis konsoli lin per la promeso ke Georgeo Vaŝington reportos la katidojn la proksiman matenon.

Tiun vesperon la gepatroj de Karlo jam foriris al teatro, kaj mi aliris al mia ĉambro por studi. Post la dekunua horo mi ekbruligis cigaron, estingis la elektran lumon, kaj sidis fumante en la mallumo, revante longan tempon. Ĉirkaŭ meznokto, mian atenton subite altiris malgranda sono en la fratina vestoĉambro, kiu estis proksima al mia ĉambro. Ĝi similis krieton de katido. Preskaŭ tuj mi aŭdis malpezajn rapidajn piedfrapojn sur la planko de la koridoro, kaj poste laŭtan blekegon de viro en la vestoĉambro. Mi kaptis mian revolveron el tirkesto, rapidis en la vestoĉambro kaj ekbriligis la elektran lumon. La vidaĵo antaŭ mi estis treege interesa: Tie staris, aŭ pli precize dancis, viro inter kies ŝultroj sidis Georgeo Vaŝington, furioze

blekante kaj diligente ŝirante per la ungegoj la vangojn de la viro, kiu vane penis kapti la beston; sed kiam ajn lia mano proksimiĝis al la kato, ĉi tiu kun plej admirinda tekniko evitis ĝin kaj mordis kaj gratis kiel freneza furio. La sango fluis de la vizaĝo de la viro mal-supren sur lian veston kiel riveretoj. Al mi eniranta, la viro kriegis:

“Forprenu ĉi tiun diablon rapide!”

“Dankojn; sed kion vi ŝtelis jam?”

“Ankoraŭ ne unu ajon. Mi ne havis la tempon.”

“Nu, mi ne deziras miksiĝi kun la kato. Pli bone ke vi eliru laŭ la vojo per kiu vi envenis.”

La viro elsaltis tra la malfermita fenestro sur la tegmenton de la verando, kaj tiam ĝis la tero, dum Georgeo Vaŝington desaltis planken kaj komencis leki katidon. Mi poste konkludis, en la maniero de Serloko Holmes, ke la kato estis kaŝinta katidon en malfermita tirkesto, kie la ŝtelisto, ĉirkaŭpalpante, trovis ĝin kaj jetis ĝin sur la plankon. La fakto ke la aliaj katidoj ankaŭ estis en la tirkesto helpis tiun konkludon.

Mi klinis el la fenestro kaj alvokis al la viro forkuranta:

“Ne revenu tien ĉi alian fojon.”

Li haltis kaj sin turnis sufiĉe da tempo por laŭte diri, “Vi iru al infero!” kaj tiam daŭrigis sian kuradon.

Georgeo Vaŝington estis heroino en la familio, la matenon sekvintan. Antaŭ la matenmanĝo Karlo tenis ŝin sur la genuoj. Li vokis al la patro triumfe:

“Ĉu ne estas Dordo Vas'n'ton la bela kato? Panjo diris ke li savis al ŝi ŝiajn juvelojn.”

“Georgeo Vaŝington estas la plej bona kaj plej bela kato en la mondo,” diris mia bofrato. “Bona Georgeo,” li daŭrigis, tuŝante karese la kapo de la besto.

Georgeo prete respondis per grato, kiu fluigis la sangon, sur la dorso de lia mano.

ROBERT M. BAILLY.

## Rakonteto Pri Li Hung Ĉang

**L**A avo de Li Hung Ĉang, la fama hina politikisto, estis kamparano. Lia filo, tamen, havis ambicion iom pli bone fari. Tiu trajto naskis frukton, kaj liaj posteuloj estis viroj de granda famo.

La patro de Li Hung Ĉang lertiĝis kiel pafarkisto kaj estis soldato. Soldato, tamen, ne estis respektita en Ĥinujo kaj, fakte, estis malestimata de ĉiuj aliaj viroj. Li lernis pri sia eraro kiam li penis trovi edzinon. Neniu permesis sian filinon edziniĝi je soldato. Li devis edziĝi kun kamparanino kiu havis piedojn naturajn. (En Ĥinujo estas signo de bona socia influo se la virinoj havas malgrandajn piedojn. Virino kiu deziras bone edziniĝi devas trovi siajn piedojn ĝis ili estas tiel malgrandaj ke ili estas reale malbelformataj.) Lia edzino estis, tamen, virino de nobla karaktero.

Ili havis bonan familion de knaboj kiuj

fariĝis viroj de granda influo. La grandaj piedoj de la patrino estis riproĉo al la filoj, kaj estis mokitaj de ĉiu. La patro ofte diris al siaj filoj: "Studadu multe kaj diligente por havi altan gradon en la servo civila. Tiam vi povos havi edzinon kiu havos malgrandajn piedojn." (La servo civila donas grandajn honorojn al tiuj, kiuj atingas altan gradon en la ekzamenoj.) Tion ili atingis tiel bone ke du el ili fariĝis vicreĝoj, kaj la aliaj fariĝis regantoj de provincoj.

Ian kiam la patrino portiĝis en sia portilo, ŝiaj piedoj videble elstaris, ekstere el la kurteno. Sia filo, Li Hung Ĉang, tiam juna viro, parolis maltime al ŝi pri ili, ĉar li hontis pri ili. La patrino estis tre indigna, kaj diris al li: "Vi hontas pri la piedoj de via patrino. Vi pardonon petu, ĉi tie kaj nun!" Kaj ŝi devigis lin genufleksi en la strato, antaŭ ĉiu.

F. A. FOSTER,  
*Tangshaw, Norda Ĥinujo.*

## Proverboj Kaj Fabeloj

Tiu, kiu havas multajn amikojn, restas sen amikoj.

Malmulto, venata de amiko, estas multo.

Nur la mulo neas sian devenon.

Tiu, kiu por sia frato fosas foson, tien falos.

La kato, kiu ne povis atingi la pecon da pulmo, diris: "Kiom ĝi malbonodoras!"

Tiu, kiu tuŝas la mielon, devas leki la fingron.

Kiam ci memoras pri la hundo, preparu al li oston (En la araba lingvo oni diras ĉiam "ci," ne "vi").

Viro konstruis malgrandan domon. Liaj amikoj diris al li: "Cia domo estas malgrandega. Kial?" Li respondis: "Mi

feliĉega estus se mi povus pleniĝi ĝin je amikoj."

*Djha* havis mulon. ("Djha" estas nomo de araba malspritulo: ĉe la araboj, oni diras "djha" al iu, por montri ke li estas malsprita.) Unu el liaj amikoj venis por peti ke li bonvole pruntu la mulon. *Djha* respondis: "Mi multe bedaŭras, mia amiko, sed mia mulo ne estas nun ĉi tie." Apenaŭ li diris tiujn vortojn, kiam la mulo blekegis. Tiam diris la amiko: "Ho, vi ne volis prunti ĝin al mi!" Respondis *djha*: "Malsprita amiko, do vi ne kredas min, sed vi kredas la mulon!"

*El la araba tradukis*  
GASTON SAMAMA,  
*Tuniso (Afriko).*